

Enhavo

1	El Japanio	2
1.1	Forpasis <i>Rihej NOMURA</i> – la kompilinto de “Zamenhofa Ekzemplaro” (<i>Akira MORITA</i>).....	2
1.2	Japania lingvisto pri hereza lingvo: <i>TANAKA Katsuiko</i>	3
1.3	Japania Esperantologio 3	4
2	Libro pri lingvaj politiko kaj kulturo – recenzo (<i>Věra Barandovská-Frank</i>).....	5
3	Personaj bibliografioj	7
3.1	<i>Till Dahlenburg</i>	7
3.2	<i>Balázs Wacha</i>	11
3.3	<i>Fritz Wollenberg</i>	13
3.4	<i>Carlo Minnaja</i> – okaze de libro.....	17
3.4.1	Pri la persono	18
3.4.2	Historio de libro	18
3.4.3	Bibliografio	20
3.5	<i>Dalibor Brozović</i> (<i>Nikola Rašić</i>).....	25
3.5.1	Omaĝe al granda kroata lingvisto	25
3.5.2	Resumo de festlibra artikolo.....	26
3.5.3	Esperantologiaj kaj interlingvistikaj verkoj	26

1 El Japanio

1.1 Forpasis Rihej Nomura – la kompilinto de ”ZAMENHOFA Ekzemplaro”

Akira MORITA

Januare en 2008, kun la eminenta aĝo de 101 jaroj, mortis *S-ro Nomura Rihej* en sia hejma urbo Jôhana (Mez-Japanio). Li lernis Esperanton ĝuste kiam la Movado, restaŭrinte la nivelon atingitan ĵus antaŭ la Unua Mondmilito, spertis la senprecedantan prosperiĝon. En 1925 li eniris en universitaton en Kyôto. Tiutempe la antikva metropolo estis bolanta centro de junaj inteligentaj esperantistoj, inter kiuj viciĝis ankaŭ la medicinstudento *Hideo Yagi*, kiu poste fariĝis prezidanto de UEA. S-ro Nomura estis ligita kun ili per vivolonga samideaneco. Post sesjara studo la diplomiginta ekonomikisto revenis hejmen kaj fondis tie malgrandan tekstilindustrian firmaon, kiun li estris.

La ideo kompili praktikan stilvortaron de Esperanto ĝermis jam frue el la propra kaj nepra bezono. Plena Vortaro ankoraŭ ne ekzistis, kaj la sola konsultlibro de Kabe ŝajnis esti tro lakona. S-ro Nomura konfesis:

„Esperanto kiel ajn facila ĝi estas kompare kun naciaj lingvoj, apartenas al speco tute alia ol mia gepatra lingvo (...). La okcidentanoj malfacile povas prezenti al si, kiel ni eksterokcidentanoj estas afliktataj pri la ĝusta uzado de iu vorto, kiel ofte ni devas cerbumi, kiun vorton elekti por esprimi nin en Esperanto. Trovante neniun solvon ni palpe serĉas kvazaŭ en mallumo ian signon, kiu montras al ni la direkton, en kiu ni povos fari paŝojn. Kaj kiel ĝojigas kaj trankviligas nin eĉ unu sola ekzemplo por duba vorto aŭ esprimo!“ (Nomura 1989:9).

Tiujn esperigajn signojn en densa mallumo li kredis trovi unuavice en la verkoj de Zamenhof kaj komencis kolekti kaj analizi esprim-manierojn taŭgajn servi kiel modeloj. La laboro estis daŭrigata kun mirinda persisto kaj entuziasmo malgraŭ la materia mizero dum kaj post la Dua Mondmilito.

Nur en 1954, okaze de la 41-a Kongreso de Japanaj Esperantistoj lia valora penado estis vaste rekonata kaj ĝi publikiĝis por la unua fojo libroforme: EKZEMPLARO ESPERANTA (stencilita tajpaĵo 479-paĝa).

En 1964 ĉe Librejo Pirato aperis PRAKTIKA VORTARETO KUN EKZEMPLOJ, kiu estis fakte ekstrakto de la ĵus menciita verko. Pro sia oportuneco la vortareto estis tiel varme akceptata de komencantoj, ke ĝia eldonnombro proksimiĝis al 4,000. En 1981 sekvis korelingva versio.

Intertempe S-ro Nomura neniam ĉesis plibonigi sian kompilaĵon. La manuskripto ampleksiĝis ĉiam pli kaj pli, sed neniu kuraĝis publikigi ĝin ‘en tuto’, ĝis NEC (Nagoja Esperanto-Centro) aŭdacis preni sur sin la rolon de eldonisto. La kontrakto inter S-ro Nomura kaj NEC estis farita somere en 1980. Sed kiu antaŭvidis tiam, ke oni devos streĉi sin ankoraŭ plenajn 9 jarojn por venki ne nur kolosan financan malfacilon sed ankaŭ aron da editoradaj problemoj, kiuj tamen estus hodiaŭ plejparte facile solveblaj per apliko de komputilo!

Al la finpretigita ZAMENHOFA EKZEMPLARO – La uzado de vortoj kaj la esprimoj el la verkoj de D-ro L. L. Zamenhof -- (formato A4, 567-paĝa) reagis unua la kultura societo OSIEK. Ĝi aljuĝis al la libro la PREMION de la jaro 1990. Samtempe Japana Esperanto-Instituto honoris la kompilinton per la Premio Ossaka. La feliĉa duobliĝinta festo estis solene celebrata kadre de la 77-a Kongreso de Japanaj Esperantistoj okazigita en Yokohama.

Foliumante la verkon oni tuj komprenas, kio fascinadis S-ron Nomura dum lia tuta vivo; okulfrape riĉaj kaj variaj esprim-kapabloj de Esperanto dokumentitaj tie nete ordigite.

Siajn lastajn vivjarojn dediĉis S-ro Nomura al la reviziado. Por garantii la trezoron al estontaj generacioj NEC proponis refoje al li la eblecon transmisi la manuskripton provizore en elektronan medion, tamen li rifuzis la ideon opiniante ke la presa formo sola estas alirebla por tiuj kiuj ne posedas multekostan elektronikan maŝinon. Sed samtempe li sciis, kiel malfacile estas realigi sian kordeziron, precipe en la ekonomie maltrankviliĝanta nuntempo. Verŝajne el tiu ĉi dilemo li metis sur la titolpaĝon de la lasta manuskripto la sekvantan linion:

Dua, prilaborita eldono prese elironta iam aŭ neniam

Akira MORITA (mirza@nexyzbb.ne.jp)

Rimarko de la Redaktoro:

S-ro Akira MORITA modeste prisilentis sian propran kontribuon al la verko kiel kuneditoro, kiu dediĉis multege da horoj al la fina prespretigo de la verko. Ankaŭ Geoffrey Sutton laboris por la libro. S-ro Morita donacis al „Gesellschaft für Interlinguistik“ (GIL, Societo pri Interlingvistiko), al kiu li kiel germanisto en 2008 aliĝis, kelkajn ekzemplerojn de la valora libro, pri kiu GIL tre dankas.

Jen la plenaj informoj pri la libro:

Nomura, Rihej (1989): Zamenhofa Ekzemplaro. La uzado de vortoj kaj esprimoj el la verkoj de D-ro L.L. Zamenhof. Editoris Geoffrey Sutton kaj Akira Morita. Nagoya: Nagoya Esperanto-Centro, 512 p.

1.2 Japana lingvisto pri la hereza lingvo: TANAKA Katsuiko

La japana lingvisto *prof. d-ro TANAKA, Katsuiko* antaŭ nelonge publikigis jenan japanlingvan libron:

Tanaka, Katsuiko (2007): Esuperanto - Itan no gengo. Tokyo: Iwanami Shoten, (Esperanto – la lingvo hereza), 220 p.

S-ro KITAGAWA Hisasi (hisasi@ue.netyou.jp) afable al ni donis la esperantlingvajn informojn pri la enhavo:

Antaŭparolo

Ĉapitro 1: Homoj ne kritiku la lingvon --- ĉar ĝin kreis Dio/ Dio kreis la lingvon / Herder neis la dian devenon de la lingvo / ne Dio, sed la 'natura' --- la biologiisma koncepto /la kontribuo de Ferdinand de Saussure / la amaso fikstenas la lingvon / tamen la lingvo estas kritikata --- serĉo al apriora lingvo / la malkovro de la 'lingvo en si mem' / provoj de lingva reformo kaj lingva kreado / la 'profunda strukturo', pseŭdoapriora lingvo / la epoko de naciaj lingvoj /diversaj aposterioraj lingvoj / simpligita angla --- BASIC /la germana koncedis, sed la japana ne / lingva simpligo kaj uzas lingvan diskriminacion /novaj planitaj lingvoj / neevitebleco de lingva planado / la kriterio de facila lernebleco / Volapuko.

Ĉapitro 2: Kia lingvo estas Esperanto --- konciza skizo de la alfabeto kaj prononcado / la gramatiko / pri '-ino' / 'mal-' /fleksio kaj aglutino / konverĝo al la aglutina tipo / estetika favoro al la fleksio / la sistemeco trarompas la normon! / la gramatiko kaj la leksikono.

Ĉapitro 3: Kritikantoj kaj kontraŭmetitaj lingvoj kontraŭ Esperanto, ne decas kritiki la naciajn lingvojn / oni rajte kritikas planlingvojn / diversaj reformprojektoj de Esperanto / la ekzemplo

de Jespersen /ĉu Esperanto estas bela? / ĉu Esperanto estas facila? / praktikado de Esperanto --
- traduko / de 'Patro Nia' ĝis 'La Japana Kroniko' / judoj kaj Esperanto --- pri la gepatra lingvo
de Zamenhof / malakcepto de la cionismo post funda pripenso / la vojo de senŝtata lingvo /
George Orwell kaj Esperanto / parodio de la esperanta gramatiko / lingva konservatismo de
verkistoj / Lanti --- iama kunloĝanto de Orwell / la morto de Lanti.

Ĉapitro 4: Esperanto en Azio, la lingvo de espero ĝuste en Azio / la akceptiĝo en Japanio /al
anarkiistoj pere de OOSUGI Sakae / la Esperanto-Lernejo en Shanhajo / HUTABATEI kaj la
unua lernolibro en Japanio / ekstravaganca vagabondo HUTABATEI / Vasilij Eroŝenko /
Eroŝenko kaj lia kompanaro / la panfarejo Nakamura en Shinzyuku kaj Eroŝenko / la finna
ambasadoro Ramstedt / vojaĝo en Mongolio de Ramstedt / esperantisto Ramstedt /
YANAGIDA Kunio / NITOBĖ kaj YANAGIDA klopodas ĉe la Ligo de Nacioj /
MIYAZAWA Kenzi kaj Ramstedt / esperanta loknomo --- Ihatovo / disvolviĝo de Esperanto
sur neatendita tereno --- Oomoto kaj Esperanto / internacia misio per Esperanto / naciisto
KITA Ikki kaj Esperanto / anarkiisto konvinkis la naciiston / disvolviĝo de la Esperanto-
movado en Ĉinio / Esperanto kiel komuna lingvo de japanoj kaj ĉinoj / Esperanto-kurso en la
Pekina Universitato! / Eroŝenko montras sin en Pekino / akceptiĝo de Esperanto en Mongolio
/ esperantisto el monaĥejo / enkonduka lernolibro en la mongola represita per la helpo de
japano / disdialektiĝo de Esperanto aŭ naciismaj stiloj.

Ĉapitro 5 La lingvon al la mano de la homoj! / la tempo, en kiu Esperanto estis naskita /
malŝato kontraŭ Esperanto flanke de lingvistoj / lingvistoj kun simpatio kaj intereso pri
Esperanto / lingvistoj propramotive subtaksantaj Esperanton / lingvisto kun kompreno kaj
aprobo --- Antoine Meillet / la lingvoj estas elektataj ne laŭdestine sed laŭvole! / la timo
paroli en establita nacia lingvo / Esperanto --- trezorkesto de la eŭropaj lingvoj / utiloj de
Esperanto-lernado.

Postparolo

Referencitaj libroj kaj dankoj

1.3 Japano Esperantologio 3

Aperis la tria volumo de la eldonaĵo de Japano Esperanto-Instituto "Japano Esperantologio".
Tiaj eldonaĵoj estas tre bonvenaj kaj meritas imiton flanke de aliaj landaj institucioj.

Japano Esperantologio. N-ro 3 (2008). Bulteno de Japano Esperanto-Instituto, 133 p.
Ĉefredaktis WATANABE Katsuyoshi.

Enhavo

El la 92a Universala Kongreso de Esperanto

<i>Usui Hiroyuki</i>	De superregado de "okcidento" al "interlokaj dialogoj"
<i>Aleksandra Watanuki</i>	Disvolvigo de la japana kulturo en Eŭropo el la ekzemplo de Mangao en Pollando
<i>Sergey Anikeev</i>	La rusa kulturo kaj la japana socio
<i>Mai Wenbiao (Bill Mak)</i>	"Okcidenteco" en la cina lingva medio: akcepto kaj rezisto
<i>Ulrich Lins</i>	Esperanto kiel lingvo kaj ideo en Ĉinio kaj Japanio
<i>Ahmad Reza Mamduhi</i>	Okcidento en Orienten: Prosperiga Defio
<i>Probal Dasgupta</i>	La akcepto, la rezisto kaj la diglosio: la kazo de la angla en Barato

A. Giridhar Rao De modernismo al postmodernismo: La ŝanĝanta evoluiga tagordo en Barato

El la 5a Internacia Nitobe-Simpozio (en la japana)

Mark Fettes (trad. Kitagawa Hisasi) Esperanto, ĉu azia lingvo?: kreskigaj kaj limigaj faktoroj en evoluanta interlingva ekosistemo

Probal Dasgupta (trad. Usui Hiroyuki) La vivanteco de la gepatraj lingvoj: uzi la tradukadon kiel kultivilon

Artikoloj (en la japana)

Usui Hiroyuki La propono de KITA Ikki enkonduki Esperanton: gaj fontoj, praktiko, kaj perspektivo

Kadoja Hidenori "Laŭlingvorajta voloro" de esperanto kaj la esperanto-movado - ĉefe ĉirkaŭ komprenomaniero de lingvolernado kaj konscio de lingva regulo

Recenzoj (en la japana)

Watanabe Katsuyoshi Ziko Marcus Sikosek: Sed homoj kun homoj: Universalaj Kongresoj de Esperanto 1905-2005. Roterdamo 2005, 197p.

Sibayama Zyun 'iti Raporteto: Esperantologia Konferenco en la 92a UK Regularo de Japana Esperantologio

2 Libro pri lingvaj politiko kaj kulturo - recenzo

Věra Barandovská-Frank

Detlev Blanke, Jürgen Scharnhorst (2007, Eld.): Sprachenpolitik und Sprachkultur. Sprache, System und Tätigkeit, Band 57. Frankfurt am Main, Berlin etc.: Peter Lang, europäischer Verlag der Wissenschaften 280 p. ISBN 978-3-631-5592-7. Germanlingva.

La libro pri lingvopolitiko kaj lingvokulturo enhavas 11 artikolojn-prelegojn. La plejmulto el ili estis prezentita dum la konferenco pri la samnoma temo, kiun en 2005 organizis „Gesellschaft für Interlinguistik“ (GIL, Societo pri Interlingvistiko, kiun prezidas *Detlev Blanke*), kaj „Verein zur Förderung sprachwissenschaftlicher Studien“ (VFsS, Societo por antaŭenigo de lingvistikaj studoj, kiun prezidas *Jürgen Scharnhorst*). GIL fondiĝis en 1991 kun la celo popularigi interlingvistikajn ekkonojn, subteni esploron kaj instruadon ĉi-kampe kaj ebligi kunlaboron de interlingvistoj. Laŭ kompreno de GIL, interlingvistiko ampleksas ĉiujn problemojn de internacia lingva komunikado, do interalie lingvopolitikon kaj lingvokulturon, kiuj iĝis temoj komunaj kun VFsS. Tiu ĉi organizaĵo subtenas esplorojn pri lingva kulturo en historio kaj nuntempo, ne nur rilate al la Germana, sed ankaŭ al aliaj lingvoj. Ĝi kunlaboras kun simile interesigantaj organizaĵoj, tial jam en 1999 okazis komuna konferenco kun GIL pri eŭropa lingvopolitiko¹.

Detlev Blanke estas internacie konata interlingvisto, habilitiĝinta jam en 1985 pri planlingvoj ĉe Humboldt-Universitato en Berlino, kie li havas docentajn rajtojn.

¹ Temas pri la 9-a konferenco de GIL, kiun ĝi komune okazigis kun VFsS de 12.-14.11.1999. Aperis la aktoj de la konferenco: Blanke, Detlev (2001, Red.): Sprachenpolitik in Europa. En: Interlinguistische Informationen. Beiheft 6, 160 p.

Jürgen Scharnhorst estas germanisto kaj slavisto, specialiĝinta pri teorio kaj praktiko de lingvokulturo, laborinta ekde 1954 en Berlino por Akademio de Sciencoj kaj Humboldt-Universitato.

En la *enkonduka* prelego-artikolo Jürgen Scharnhorst klarigas la nocion „lingvopolitiko“: en la germana ekzistas terminoj „Sprachenpolitik“, se temas pri statuso kaj socia funkcio de (pluraj) lingvoj, kaj „Sprachpolitik“ por politika oficialigo kaj uzo de unu (komuna) lingvo. Plue estas analizata lingvosituacio kaj ties karakterizaĵoj, lingvokulturo kaj la evoluoperspektivoj. La aŭtoro substrekas, ke lingvistiko devas ĉi-kampe kunlabori kun sociologio, psikologio, kulturscienco kaj politikscienco, samkiel kun literatur-scienco, etnologio kaj politiko. La interdisciplineco tamen ne estas esence nova, sed ankaŭ de interlingvistoj jam delonge postulata fenomeno.

Gerhard Stichel prelegis pri Eŭropa Federacio de Naciaj Lingvoinstitucioj², kiuj flegas kulturajn valorojn de unuopaj eŭropaj lingvoj. Li demandas, kio estas propra lingvo kaj etna lingvo, kiun individuan kaj kolektivajn valoron ili havas, plue li analizas la socian kaj kulturan rolojn de la lingvo, antaŭ ol paroli pri internacieco kaj ties problemoj. Li prave konstata mankon de tiurilataj ŝtataj instancoj.

Pri Romanaj lingvoj kaj lingvaj institucioj interesiĝis *Johannes Klare*. Kaze de la franca temis precipe pri ties internaciigo pere de diversaj organizaĵoj, kiel Alliance Française, kaj eĉ pri ekesto de francaj kreoloj. Ĉe la hispana kaj itala lingvoj estis menciita ĉefe la grava laboro de iliaj akademioj kaj de Instituto Cervantes. Vidiĝas la neceso, ke tiaj institucioj kunlaboru almenaŭ eŭropanivele.

Wim Jansen okupiĝis pri la Nederlanda en kunteksto de eŭropa lingvopolitiko. Li konstatis, ke nederlandaj lingva kaj kultura politikoj apenaŭ helpas sian lingvon en la batalo travivi en diversaj uzadkampoj kaj pledis pri konstitucia protekto de gepatra lingvo, kiu estis pridiskutita i.a. en landaj ĵurnaloj. Similan temon rilate al la Ĉeĥa elektis *Vít Dovalil*, menciante krome la lingvojn de etnaj minoritatoj en Ĉeĥio.

La artikolo de *Rudolf-Josef Fischer* alportis statistikojn pri uzo de la angla lingvo en Germanio, el kiuj klaras, ke la fakta scipovo de la lingvo ne estas tiom bona kiom oni oficiale asertas: la politikistoj antaŭvidas german-anglan dulingvecon, kiu tamen ne estos tiom facile realigebla. Per la demando, ĉu la angla iĝu „Lingua franca“, Fischer kvazaŭ enkondukis la sekvan artikolon de *Sabine Fiedler*, kiu klarigas kaj analizis la komunikadon en „Lingua franca“ kompare kun Esperanto. La eldonistoj lerte envicigis tiun ĉi artikolon en la libron, ĉar ĝi ebligis logike transiri al la sekva temo, nome lingvopolitikaj aspektoj de Esperanto kaj aliaj internaciaj lingvoj, kiun prezentis *Detlev Blanke* mem. En la konkludo de sia prelego formuligis Blanke tre singarde, ke „estus penseble“, ke la lingvistoj kaj politikistoj „povus ricevi instigon“ pere de modelo de internacia lingva komunikado, kiun reprezentas Esperanta lingvo-komunumo. Sub tia formuligo kaŝiĝas preskaŭ kontraŭvola, sed prava konstato, ke, eĉ se Esperanto plenumas ĉiujn funkciojn de „normala“ lingvo, nek la publiko, nek la oficialaj lokoj akceptas ĝin kiel seriozan. Kunigi la konferencon de ambaŭ organizaĵoj kaj eldoni ties kontribuojn en prestiĝa eldonejo sekve estis bone direktita paŝo. La libron kompletigas dokumentoj pri lingvopolitika simpozio Nitobe, bibliografio de la pritema literaturo kaj lingvogeografia mapo de Eŭropo.

Lingvopolitiko en hodiaŭa Eŭropo estas ĉiam denove aktualigata kaj ankoraŭ ne kontentige solvita temo, tial ĉiu nova kontribuado estas bonvena.

² “Fédération européenne des institutions linguistiques nationales”, “European Federation of National Institutions for Language”

(Aperis en Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft/Humankybernetik [grkg] Vol. 48 (2007), Kajero 4:189-190).

Rimarko de la redaktoro:

Pro la bona vendo-sukceso la eldonejo decidis pretigi duan eldonon de la recenzita libro, kiu supozeble aperos komence de 2009.

3 Personaj bibliografioj

3.1 Till Dahlenburg

Dr. paed. Till-Dietrich Dahlenburg (*19.01.1934 en Potsdam) antaŭ nelonge festis sian 75-an naskiĝtagon. Tio estas bona kialo per publikigi la bibliografion de liaj verkoj. Till Dahlenburg studis slavistikon kaj latinistikon ĉe Humboldt-Universitato en (orienta) Berlino kaj ĉe Wilhelm-Pieck-Universitato en Rostock. Li estis gimnazia instruisto por la lingvoj rusa, latina, germana kaj Esperanto en la gimnazio de la urbo Brüel kaj ĉe la vespera popola alternejo en la urbo Sternberg; ambaŭ lokoj troviĝas ĉe Schwerin, ĉefurbo de la germana federacia lando Mecklenburgio/Antaŭpomerio. Li ankaŭ kunlaboris ĉe la pretigo de instruistoj por la rusa en Berlin kaj Güstrow kaj ĝis 1990 estis konsilisto por la rusa instruado en la distrikto Sternberg.

Till Dahlenburg estis unu la plej gravaj fakuloj en la Centra Estraro de GDREA, kie li gvidis la fakan komisionon pri metodiko de la instruado de Esperanto. Li publikigis modernan lernolibron, kiun la ŝtata eldonejo Enzyklopädie-Verlag Leipzig reprenis en 5 eldonoj. Li krome verkis diversajn eseojn kaj metodikajn materialojn. Aparte grava estas lia pionira verko pri stilfiguroj en Esperanto.

D-ro Dahlenburg ankaŭ havis internaciajn funkciojn kaj apartenis al la Estraro de ILEI (1987 – 1996); post la germana unuiĝo estis vicprezidanto de Germana Esperanto-Ligo (1993 – 1998) kaj vicprezidanto de FAME-Fondaĵo (1996 – 2002). Till Dahlenburg apartenas al la kunfondintoj de Societo pri Interlingvistiko (germana mallongigo GIL).

Mallongigoj:

de	<i>der esperantist</i> , oficiala organo de GDREA.
ea	<i>Esperanto aktuell</i> , oficiala organo de GEA
eki	<i>Esperanto kaj instruado</i> , revueto de la asocio de germanaj Esperanto-instruistoj
FU	<i>Fremdsprachenunterricht</i> , faka revuo pro la instruado de fremdlingvoj en GDR
GDREA	kutima internacia mallongigo por la Esperanto-Asocio de GDR
IntI	<i>Interlinguistische Informationen</i> , bulteno de Gesellschaft für Interlinguistik e.V.(GIL, Societo pri Interlingvistiko).
IPR	<i>Internacia Pedagogia Revuo</i> , Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI).
ja	<i>Juna amiko</i> , Internacia Esperanto-Revuo de ILEI por lernejoj kaj komencantoj.
ks	kaj sekvaj (paĝoj)
LF	<i>Literatura Foiro</i> . Kultura revuo en Esperanto.

(1) Libroj kaj broŝuroj

- (1978a, kun Peter Liebig): *Taschenlehrbuch Esperanto*. Unter redaktioneller Mitwirkung von Erich-Dieter Krause. 1-a eldono 1978 (5-a eldono 1990). Leipzig: Enzyklopädie, 266 p.
- (1978b): *Begleitmaterial für Kursleiter zum „Taschenlehrbuch Esperanto*. Berlin 1978 kaj 1983: Berlin: Kulturbund der DDR, 74 p.
- (1979): *Begleitmaterial für den Selbstunterricht zum „Taschenlehrbuch Esperanto“* (Unter Mitwirkung von Mitgliedern der Fachgruppe Methodik des Esperanto-Unterrichts). Berlin 1979 kaj 1983. Kulturbund der DDR, 77 p.
- (1990a, kun Detlev Blanke): *Konversationsbuch Deutsch – Esperanto. Konversacia Libro Germana-Esperanta*. 1-a eldono 1990. Leipzig: Enzyklopädie, 210 p.; (2-a prilaborita eldono 1998. Wien: IEMW, 175 p.)
- (1996): *Esperanto - eine neue Brücke zur Welt. Für den Kurs- und Selbstunterricht*. Torino: Heroldo de Esperanto, 251 p.
- (2006): *Pli lume la mallumo zumas... Stilfiguroj en la poezio de esperanto. Esperantlingva vortaro kun difinoj kaj ilustraĵoj el la internacia poemkreado*. Novjorko: Mondial, 215 p.

(2) Artikoloj en revuoj kaj antologioj

- (1959): „Über einige Arbeitsverfahren bei der Aneignung lexikalischer Kenntnisse. En: *FU* 10/1959, p. 546 ks..
- (1960): „Gymnastische Übungen mit fremdsprachigen Anweisungen“. En: *FU* 8/1960, p. 493-496; 4/1963, p. 227 k.s
- (1970): „La instruado de fremdaj lingvoj“. En: *de* 1/1970, p. 16.
- (1970/71): „Kiel komenci instruhoron?“. En: *de* 44, p. 7; 45, p. 6-7.
- (1982a): „Psikologiaj premisoj – metodikaj konsekvencoj. En: Barcsay, Zsuzsa (Red.): *Metodiko en la praktiko*. Paderborn: Esperanto-Centro. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, p. 39-42.
- (1982b): „Instruhoroj por plenkreskuloj“. En: Barcsay, Zsuzsa (Red.): *Metodiko en la praktiko*. Paderborn: Esperanto-Centro. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, p. 45-47.
- (1982c): „Pädagogischer Wert des Esperanto-Unterrichts“. En: Blanke, Detlev (1982): *Esperanto und Wissenschaft (Zur Plansprachenproblematik)*. Berlin: Kulturbund der DDR, Esperanto-Verband, p. 39-43 (2-a eldono 1986)
- (1983): „Die internationale Plansprache Esperanto als Unterrichtsgegenstand. (Entwicklung, pädagogischer Wert, Ergebnisse, Vorschläge)“. En: *de* 3/1983, p.50-62; 4/1983, p. 74-84.
- (1987a): „Ĉu belarta verko apartenas al instruhelpiloj?“. En: *IPR* 2-3/1987, p. 29-33.
- (1987b): Zum Wert des Erlernens von Esperanto. En: *de*, Sondernummer 1987, p. 15-16.
- (1988a): „Internaciismoj: Ĉu helpo, baro aŭ rezerva fonto en lernado de Esperanto?“. En: *IPR* 1/1988, p. 23-28.
- (1988b): „Internaciaj vortoj en Esperanto, ĉu balasto aŭ propedeŭtika utilaĵo?“. En: Ejsmont, Tadeusz (Red.): *El teorio kaj praktiko de Esperanto-instruado. 21-a Konferenco de ILEI en Lodzo (17 – 24 julio 1987)*. Lodzo 1988: RITMO, p. 51-55.
- (1988c): „Analizo de konversaciaj libroj (etnolingvaj – Esperanta)“. En: Ejsmont, Tadeusz (Red.): *El teorio kaj praktiko de Esperanto-instruado. 21-a Konferenco de ILEI en Lodzo (17 – 24 julio 1987)*. Lodzo 1988: Ritmo, p. 56-65.
- (1988d): „La motivado de la instruisto“. En: *IPR* 3/1989, p. 1-6.

- (1990a): „Esperanto in der DDR – Zur Spezifik der Plansprache Esperanto unter besonderer Beachtung von Fragen ihrer Erlernung“. En: Breitung, Horst (Red.): *Das Wort. Germanistisches Jahrbuch 1990, DDR – UdSSR*. Moskau – Berlin, p. 222 – 229 u. 398 – 401.
- (1990b): „La motivado de la instruisto. En: Esperanto-Teacher, Nr. 161, p. 6-7.
- (1990c): „Wieviele Sprachen ein Mensch kann, so viele Male ist er Mensch. [Literarische Reminiszenzen in der schöngeistigen Literatur]“. En: *eki* 3/1996, p. 4-9.
- (1994): Esperanto in einer vielsprachigen Gemeinschaft. En: *eki* 2/1944, p. 5-11.
- (1997a): „De legado sen atento ne riĉiĝas la prudento (Vorschläge für lehrbuchgelöste Sprechphasen im Esperanto-Unterricht mit Bezug auf allgemeinbildende Werte)“. En: *eki* 4/1997, p. 5-14.
- (1997b): „Por kursgvidantoj: Paronimoj“. En: *ja* 1/1997, p. 17.
- (1997c): „Por kursgvidantoj: Mnemotekniko“. En: *ja* 3/1997, p. 15.
- (1997d): „Von Mund zu Mund rollt's rein und rund“. En: *ea* 16 (1997)1, p. 8-9.
- (1997/1978): Zur Arbeit mit dem Lehrbuch „Esperanto - eine neue Brücke zur Welt“. En: *eki* 1/1997, p. 5-12; 2-3/1997, p. 5-13; 1/1998, p. 5-13; 2/1998, p. 5-11.
- (1998): „Por kursgvidantoj: Flagoj“. En: *ja* 1/1998, p. 10; 3/1998, p. 20.
- (1999a): „Germanio prezentas sin [okaze de la UK 1999 en Berlin]“. En: *ja* 4/1998, p. 12-15.
- (1999b, kun Detlev Blanke): „Plansprachen als Mittel internationaler Kommunikation: Esperanto - ein linguistisches Experiment und Unterrichtsgegenstand“. En: *Fremdsprachenunterricht* (Berlin), Nr. 43/52(1999)4, p. 298-300 (same en: *eki* 3/1999, p. 12-23).
- (1999c): „Por kursgvidantoj: Fizikaj eksperimentoj“. En: *ja* 2/1999, p. 24
- (1999d): La du eldonoj de „Konversacia libro Germana - Esperanta/Konversationsbuch Deutsch-Esperanto – komparo de la enhavoj. En: *eki* 3/1999, p. 5-10.
- (1999/2000): „Kelktempa ĉeso - jam venas forgeso. Spertinterŝanĝo pri plulernado“. En: *eki* 4/1999, p. 5-12; 2/2000, p. 7-12
- (2000a): „Por kursgvidantoj: La tikla rolo de la sufikso -ig“. En: *ja* 3/2000, p. 22.
- (2000b): „Amiko estas kara, sed vero pli kara. Kiel preventi enmiksiĝon de falsaj amikoj en individuan vortprovizon?“. En: *eki* 3/2000, p. 5-11.
- (2000c): „Memore al nia hungara kolegino Zsuzsa Barcsay-Behrmann“. En: *eki* 4/2000, p. 6-8.
- (2001a): „Politika aktualeco en Esperanto-lernolibroj de orientgermanaj aŭtoroj“. En: Fiedler, Sabine/Haitao, Liu (Red.): *Studoj pri interlingvistiko. Festlibro omaĝe al la 60-jariĝo de Detlev Blanke*. Dobřichovice: Kava-Pech, p. 565-584.
- (2001b): „Por kursgvidantoj: Kemia eksperimento“. En: *ja* 2/2001, p. 7
- (2001/2002): „Por kursgvidantoj: Stilfiguroj“. En: *ja* 4/2001, p. 19; 2/2002, p. 13.
- (2001/2002/2003): „Sugesto en arta vesto. Artikolserio pri retorikaj figuroj okaze de la apero de „Lexikon der Sprachkunst“ de J. Dominik Harjung“. En: *eki* 2/2001, p. 5-15; 1/2002, p. 5-12; 2/2002, p. 8-22; 1/2003, p. 6-21.
- (2006): „Rhetorische Stilformen in der Poesie des Esperanto (Vorstellung eines Buchprojekts)“. En: Blanke, Detlev/Schamhorst, Jürgen (Red.): *IntI, Beiheft 13, Sprachenpolitik und Sprachkultur*. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e.V., p. 195-206
- (2007): „Feinheiten in der Esperanto-Dichtkunst. Eine einführende Erläuterung zu dem Buch „Pli lume la mallumo zumas...Stilfiguroj en la poezio de esperanto“. En: *ea* 5/2007, p. 16 f.
- (2008): „Sinn und Form. Gedanken zu Esperanto-Übertragungen von Poesie“. En: *ea* 1/2008, p. 18 f.

(3) Recenzoj

- (1978): „Bulgara Lernolibro“ REC pri „Lernolibro de Esperanto por la unua lernojaro“. En: *de* 5/1978, p. 22.
- (1983): REC pri Peter De Smet (1982): Esperanto snel assimileren. Een snelkursus van de internationale taal Esperanto in vijf lessen (plus tien lessen verdere uitbouw) voor zelfstudien. En: *de* 6/1983, p. 139.
- (1985): REC pri Seppik, Henrik (1984): La tuta Esperanto. Gramatiko por progresintoj. Gvidilo por kursestroj. Tria eldono. En: *de* 2/1985, p.39.
- (1986a): REC pri Semjonova, Z.V.; Isaev, M.I. (1984): Lernolibro de la lingvo Esperanto (Učebnik jazyka Esperanto). En: *de* 1/1986, p. 18.
- (1986b): REC pri Oljanov, Violin (1985, Red.): Interlingvistiko. Esperantologio. Sofio: Bulgara Esperanto-Asocio, 252 p. En: *de* 3/1983, p. 69.
- (1988): REC pri Ŝulco, Rikardo: Sur la vojoj de la Analiza Skolo. Esperantologia esearo. En: *de* 3/1988, p. 66 f.
- (1989): REC pri Vaha, Blazio (1987): Adolesko. Originala romano. En: *de* 5/1989, p. 118f.
- (1993): REC pri Pit, Klaas / Stilma, Bert: Kvar jarcentoj - Komenio. Esperantlingva versio de la nederlanda publikaĵo „Vier eeuwen - Comenius“, tradukita de Zsuzsa Barcsay. En: *IPR* 2/1993, p. 14/15.
- (1994): REC pri Szanszer, Irena (1992): Teorio kaj praktiko de lingvo-instruado. En: *IPR* 4/1994, p. 26-28.
- (1996a): REC pri Blanke, Detlev: Esperanto kaj lingvistiko - sciencpolitikaj aspektoj; Blanke, Wera: Fakvortoj en Esperanto – kion fari, se la vortaro ne plu helpas? Esperanto-Dokumente 2. Osnabrück: Deutsches Esperanto-Institut (1995). En: *La dua jarcento* (Wien), Nr. 2/1996. p. 24.
- (1996b): REC pri Blanke, Wera (1995): Fakvortoj en Esperanto - kion fari se la vortaro ne plu helpas? En: *IPR* 3/1996, p. 27-28.
- (2000): Salutu la kusenon!. REC pri Fiedler, Sabine (1999): Plansprache und Phraseologie. Empirische Untersuchungen zu reproduziertem Sprachmaterial in Esperanto. En: *eki* 1/2000, p. 10-13.
- (2001a): REC pri Fiedler, Sabine (1999): Plansprache und Phraseologie. Empirische Untersuchungen zu reproduziertem Sprachmaterial in Esperanto. En: *Esperantologio / Esperanto Studies* 2, 2001, p. 58-64.
- (2001b): REC pri Albault, André/Doublot, Jean (2001): Tri pri la tria. Tri raportoj pri la tria alfabeto. En: *La Gazeto* [2001], n-ro 108, p. 22.
- (2001c): REC pri Yamasaki, Seikô (2000): Enkonduko en la japanan. En: *La Gazeto* [2001], n-ro 96, p. 23/24.
- (2002): REC pri Manner-Mamužić (2000): Kompendio de la esperanta gramatiko (por superaj ekzamenoj). En: *La Gazeto* [2002], n-ro 93, p. 23/24.
- (2004): REC pri Ballendux-Bogyaey, Maria: Hungara lingvokurso. Al Esperanto adaptis Marc Vanden Bempt (2000). En: *La Gazeto*[2004], n-ro 115, p. 23/24.
- (2005): REC pri Mel'nikov, A[leksandr] S[ergeevič] (2004): Lingvokul'torologiĉeskie aspekty planovykh meždunarodnykh jazykov (na fone etniĉeskikh jazykov). En: *IntI*, Nr. 55-56 (2-3/05), p. 21-24.
- (2007): REC pri Radiguet, Raymond (2006): La Diablo en la korpo [Le Diable au corps]. El la franca tradukis Michel Duc Goninaz. En: *LF* [2007], n-ro 227, p. 146/147.
- (2008a): Ein Roman mit Esperanto-Thematik. REC pri Leupold, Dagmar (2007): Grüner Engel, blaues Land. München: Beck, 204 p. En: *IntI* 64-65, p. 33-36.
- (2008b): The Personal Past As Linguistic Creation. REC pri Pascal Mercier (1997): Perlmans Schweigen, München 1997 (639 p.). En: *IntI* 68 (3/08, p. 39-40.

(2008c): Studie zur Geschichte der sowjetischen Esperanto-Bewegung. REC pri Oleg Krasnikov, Historija Sojuzo Esperantistov Sovetskich Respublik. (En: Oleg Krasnikov/Detlev Blanke.2008: Esperanto-dviženia: fragmenty istorii. Moskva: Nauka, p. 7-114).

3.2 Balázs Wacha

La hungara lingvisto kaj esperantologo *D-ro Balázs WACHA* (* 3.10.1948), Budapest, estis disĉiplo de *István Szerdahelyi*. Li instruis Esperanton en la universitato de Szombathely, laboris laŭkontrakte en la Universitato ELTE en Budapeŝto kaj plej grandan parton de sia profesia vivo pasigis en la Hungara Akademio de Scienco, lingvistika instituto. Li ankaŭ publikigas sub la esperantigita nomo *Blazio VAHA*.

Okaze de lia 60-jariĝo ni publikigas la bibliografion de liaj verkoj.

- (1976): "Pri la esperanta verbo". En: Szerdahelyi István (Red.) *Esperantologiaj kajeroj 1*, Budapest, 155-181.
- (1980): "Az eszperantó nyelv fejlődésének némely sajátosságairól" [Pri specifajoj de la evoluo de Esperanto]. *Jelentkezünk* [Ni anoncas nin], n-ro 34, Februaro, Szombathely, 1980, 41-46.
- (1982): "La ag-aspekto en Esperanto". En: Szerdahelyi István (Red.): *Miscellanea Interlinguistica*, Budapest: ELTE, 413-422.
- (1983): "Moldova, György: Arrivederci, Budapest!" En: Benczik, Vilmos (Red.): *Hungara Antologio*, Budapest: Corvina, 431-433.
- (1984): "Pri la radikkaraktero". En: Rokicki, Ryszard (red): *Acta interlinguistica, 11-a Scienca Interlingvistika Simpozio, Varsovio 9-13-04.1983*. Varsovio: Akademickie Centrum Interlingwistyczne, 92-102.
- (1985a): "Gradoj de ekzisto". *Planlingvistiko*, Nr. 13. p. 18-21; Nr. 14 (1985), 11-7.
- (1985b): "Gradoj de ekzisto". En: Košecký, Stanislav (Red.): *Kontribuo al lingvaj teorio kaj praktiko*, (III-a parto) Poprad: Slovakia Esperanto-Asocio, 26-38.
- 1986a): "Esperanto kaj ĝia uzado en familio". En: Košecký, Stanislav (Red.): *Kontribuo al lingvaj teorio kaj praktiko*, (IV-a parto) Poprad: Slovakia Esperanto-Asocio, 61-73.
- (1986b): "Iom pri tempo kaj aspekto". En: Košecký, Stanislav (Red.): *Kontribuo al lingvaj teorio kaj praktiko*, (IV-a parto) Poprad: Slovakia Esperanto-Asocio, 74-96.
- (1987a): "Családok nemzetközi barátkozása". *Világ es nyelv*, Nr. 3, 5-6.
- (1987b): *Adolesko* (romano). Budapest: Oy Mendoservo Ak/Hungara Esperanto-Asocio, 248p.
- (1989a): "Lingvoplanado, lingvopolitiko". *Hungara Vivo*, 1989/4, 149-52.
- (1989b kun Gábor Prószéky, Ilona Koutny): "A dependency syntax of Hungarian". En: Klaus Schubert: *Metataxis in Practice. Dependency syntax for multilingual machine translation*. (Distributed Language Translation 6). Dordrecht-Holland/Providence RI - U. S. A.: Foris Publications, 151-181.
- (1991a): "A magyar nyelvnek az eszperantóra gyakorolt hatásáról". [Pri efiko de la hungara lingvo je Esperanto] En: Hajdú, Mihály – Kiss, Jenő (Red.): *Emlékkönyv Benkő Loránd hetvenedik születésnapjára* [Memorlibro por sepdekjariĝo de Loránd BENKŐ] Budapest, ELTE BTK, Mai Magyar Nyelvi Tanszék, 642-649.
- (1991b): "Dumstudajoj". *Survoje*, n-ro 3, 1991, 16-8.
- (1992): "Redundancia". [Redundo]. En: Kozocsa, Sándor Géza – Laczkó, Krisztina (Red.): *Emlékkönyv Rácz Endre hetvenedik születésnapjára*. [Memorlibro je la sepdeka naskiĝdatreveno de Endre RÁCZ]. Budapest: ELTE BTK, Mai Magyar Nyelvi Tanszék, 242-249.
- (1993a): "Tostoj de Viena lingvisto sur kabo ». *Survoje*, n-ro 14, 24-25.

- (1993b): "Különbség". En: Kozocsa, Sándor Géza (Red.): *Emékkönyv Fábrián Pal, hetvenedik születésnapjára*. Budapest: ELTE, 267-275.
- (1995a): "Etnikus nyelv és esperantó: a gyermekkori kétnyelvűség egy újabb változata". [Etna lingvo kaj Esperanto. Nova kazo de infanaĝa dulingveco]. *Regio (kisebbségi szemle)* [Regiono, minoritata revuo], Nr. 4, 77-89.
- (1995b): "Dulingveco en familio unuetna". En: Tišljár, Zlatko (Red.): *Internacia familio - utopio aŭ realaĵo*. (Internacia Jaro de Familio. Simpozio) Maribor: Inter-Kulturo, 85-91.
- (1995c): "Zweisprachigkeit in einer ungarischen Familie". En: Tišljár, Zlatko (Red.): *Internationale Familie – Utopie oder Realität? Akten des internationalen Symposiums*, Graz 1994. Maribor: Inter-Kulturo, 66-68.
- (1996a): Szerdahelyi, István/ Koutny, Ilona (1996, Red.): *Magyar-Eszperantó Kéziszótár. Hungara- Esperanta Meza Vortaro*. (Kunlaboro de Haszpra Ottó, Wacha Balázs) Budapest: Magyarországi Eszperantó Szövetség/ Hungaria Esperanto-Asocio, 835p.
- (1996b): "Lingva interefiko en dialogoj de Esperantlingvanoj. En: Košecký, Stanislav/ Tvarožek, Eduard/ Ó Riain, Seán (Red.): *Multkulturaj familioj de nuntempa Eŭropo*. Bratislavo: Esprima, 116-28.
- (1997a): "Pri redundo kaj ensociigo de planlingvo". En: Ilona Koutny/ Márta Kovács (Red.): *Struktura kaj Socilingvistika esploro de Esperanto*. Budapest: Steleto / ILEI. 61-72.
- (1997b): "Simplaj komplikajoj". *Internacia Pedagogia Revuo*. Nr. 3, 15-24.
Ankaŭ en:
http://ilei.info/ipr/ipr_1997_3.htm#Blazio%20Vaha:%20Simplaj%20komplikajoj
- (1997c): "Zamenhof első szótárai és utóéletük". [La unuaj vortaroj de Zamenhof kaj ilia posthistorio]. En: Kiss Gábor – Zaicz Gábor (Red.). *Szavak - nevek - szótárak. Írások Kiss Lajos 75. születésnapjára*. [Vortoj – nomoj – vortaroj. Artikoloj okaze de la 75a naskiĝtago de Lajos KISS] Budapest: A Magyar Tudományos Akadémia Nyelvtudományi Intézete. 458-462.
- (1998a): "Dulingve - pli simple. Internacia familio - ĉu utopio aŭ realaĵo". (Csiszár Ernő könyvének ismertetése) (Prezento de libro de Ernő CSISZÁR). En: *Magyar Nyelv [Hungara Lingvo]*, Nr. 3, 365-369.
- (1998b): „Spontanea infanaĝa alproprigo de pluraj lingvoj”. *Literatura Foiro*, 29, junio, n-ro 173, 131-132.
- (1998c): "Faktoroj de lingvoevoluo tra la historio de lingvoj, planlingvoj, Esperanto (por publiko precipe el konantoj de Esperanto kaj de la lingvo Hungara)". En: Tamás Gecső/ Zsuzsa Varga-Haszonits/ Lariko Golden (Red.): *Memorlibro. Kolekto de la prelegoj dum la solena internacia konferenco organizita okaze de la tridekjariĝo de la universitata fako Esperantologio (Budapeŝto, 17/18-04-1997)*. Budapest: ELTE, 202-266.
- (1998d): "Lingvistika konferenco en Szombathely", *Hungaraj Paĝoj*, n-ro 19, 1-4.
- (1998e): "Konferenco pri lingvo kaj praktiko". *Internacia Pedagogia Revuo*, Nr. 4, 14-18.
- (1998f): "Kvanta taksado de lingvoalproprigo". *Cirkulaĵo por esperantlingvaj paroj kaj familioj*.
- (1999a): Selektaj principoj de terminoj kaj metaterminoj. En: Malovec, Miroslav (Red.): *Modernaj rimedoj de komunikado (Koloĵo: Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko)*. Dobřichovice: Kava-Pech, 110-124.
- (1999b): "Duagradaj funkcioj". En: Balaskó Mária – Kóhn János (Red.): *A nyelv mint szellemi és gazdasági tőke* [Lingvo kiel spirita kaj ekonomia kapitalo]. Szombathely: MANYE, 295-300.
- (2000): "Képzett szó és szójelentés". En: Gecső, Tamás (red): *Lexikális jelentés. Aktuális jelentés*. Budapest: Tinta Könyvkiadó, 277-293.

- (2001): "Antaŭ-sosurumo: Fragmentoj el verkata studo pri René de Saussure". En: Sabine Fiedler – Liu Haitao: *Studoj pri interlingvistiko. Festlibro omaĝe al la 60-jariĝo de Detlev Blanke*. Dobřichovice: Kava-Pech, 547-564.
- (2002): "Ige, ragozás, idő, aspektualitás az eszperantóban és a magyarban". [Verbo, konjugacio, tensoj aspekto-rilatoj en Esperanto kaj la lingvo hungara]. In: Gecső Tamás (Red.): *Kontrasztív szemantikai kutatások*. [Kompare-semantikaj esploroj]. Budapest: Tinta Könyvkiadó, 286-299.
- (2004a): "Partes pro toto". En: Ladányi, Mária – Dér Csilla/ Hattyár Helga (Red.): „...mégonnét is eljutni túlra... Nyelvészeti és irodalmi tanulmányok Horváth Katalin tiszteletére“ (Eĉ de tie eblas transiri... lingvistikaj kaj beletristikaj studoj], 385-398.
- (2004b): "Variabilitás és nyelvi tervezés az eszperantóban és körülötte". [Variado kaj lingva planado en Esperanto kaj ĉirkaŭ ĝi]. En: Gecső, Tamás (Red.): *Variabilitás és nyelvhasználat*. [Variado kaj lingvouzo] Budapest: Tinta Könyvkiadó. Budapest, 285-293.
- (2004c): "Korpusz – státusz nélkül" [Korpuso sen statuso]. En: Gecső, Tamás (Red.): *Nyelvi kompetencia – kommunikatív kompetencia*. [Kompetento je lingvo – kompetento je komunikado] Kodolányi János Főiskola Székesfehérvár. Budapest: Tinta Könyvkiadó, 401-409.

3.3 Fritz Wollenberg – 60jara

Al la kunfondintoj de la Societo pri Interlingvistikiko (GIL, Gesellschaft für Interlinguistik) en la jaro 1991 apartenas *Fritz Wollenberg* (* 16.11.1948). Jam en GDREA (do antaŭ 1990) li estis aktiva kaj fake kaj organize kaj apartenis al la centra estraro. Post la germana unuiĝo li daŭrigis sian fakon kaj praktikan laboron kaj aparte verkis pri historiaj aspektoj de la Esperanto-movado. Li tre interesiĝas pri la ligoj de gravaj sciencistoj al Esperanto kaj la planlingva ideo kaj elfosis ĉi-rilate interesajn materialon (i.a pri Wilhelm Ostwald). Fritz Wollenberg estas edukisto kaj multe laboris por interesigi infanojn pri Esperanto. Okaze de lia 60-jariĝo ni publikigas la liston de liaj verkoj.

(1) Monografioj, kontribuoj en broŝuroj kaj libroj

- (1993): *El la historio de la Esperanto-movado en Berlin. Unua Parto 1903-1918*. Berlin: Esperanto-Liga Berlin, 77 p.
- (1994): „Die interlinguistischen Auffassungen Adolf Schmidts und sein Engagement für die internationale Sprache Esperanto“. En: *Adolf Schmidt 1860 – 1944 – Zum 50. Todestag des Geophysikers und Esperantisten am 17.10.1994*, Potsdam: Hrsg. GeoForschungsZentrum Potsdam unter Mitwirkung der Esperanto-Liga Berlin, p. 15 – 36.
- (1997a): „Der Briefwechsel Wilhelm Ostwalds zu interlinguistischen Problemen“. En: *Mitteilungen der Wilhelm-Ostwald-Gesellschaft zu Großbothen*. Hrsg. Vorstand der Wilhelm-Ostwald-Gesellschaft zu Großbothen e. V., p. 26 – 44.
- (1997b): „Der Briefwechsel Wilhelm Ostwalds zu interlinguistischen Problemen“. En: Ulrich Becker, Fritz Wollenberg: *Eine Sprache für die Wissenschaft - Beiträge und Materialien des Interlinguistik-Kolloquiums für Wilhelm Ostwald am 9. November 1996 an der Humboldt-Universität zu Berlin*, Interlinguistische Informationen, Mitteilungsblatt der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., Beiheft 3, Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e. V., p. 32 – 107.
- (1999a): mit Karl Hansel: Aus dem Briefwechsel Wilhelm Ostwalds zur Einführung einer Weltsprache. En: *Mitteilungen der Wilhelm-Ostwald-Gesellschaft zu Großbothen –*

- Sonderheft 6, Hrsg. Vorstand der Wilhelm-Ostwald-Gesellschaft zu Großbothen e. V., p. 26 – 44.
- (1999b): La Esperanto-movado en Berlino. En: Kongresa Libro de 84a Universala Kongreso de Esperanto. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, p. 42 – 46.
- (2001): „Erfahrungen bei der Erforschung und Darstellung der Berliner Esperanto-Geschichte. En: Sabine Fiedler / Liu Haitao (Hrsg.): *Studoj pri Interlingvistiko/Studien zu Interlinguistik. Festlibro omaĝe al la 60-jariĝo de Detlev Blanke. Festschrift für Detlev Blanke zum 60. Geburtstag.* Dobřichovice: Kava-Pech, p. 487-503.
- (2002): *Chronik zur Geschichte des Esperanto in Ostberlin 1945 - 1991 : ein Arbeitsmaterial.* Als Man. gedruckt. Berlin : Arbeitsgruppe zur Erforschung der Geschichte des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR, 85 S .
- (2003a): „Eine Chronologie zur Geschichte des Esperanto in Berlin“. En: Blanke, Detlev (Red.) *Beiträge zur Geschichte des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR.* Berlin: Arbeitsgruppe zur Erforschung der Geschichte des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR, p. 56 – 59.
- (2003b): „Berliner Filmjahre (Jan Fethke in Berlin)“. En: *Berlin Kalender 2003.* Berlin: Edition Luisenstadt, p. 56-57.
- (2003c): „Esperanto kommt nach Berlin (Die Gründung der Esperantista Grupo Berlina 1903)“. En: *Berlin Kalender 2003.* Berlin: Edition Luisenstadt, p. 56-57.
- (2003d): „Esperanto-Schüler-Arbeitsgemeinschaften in GDREA“. En: Blanke, Detlev (Red.) *Beiträge zur Geschichte des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR.* Berlin: Arbeitsgruppe zur Erforschung der Geschichte des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR, p. 135 – 138.
- (2006, Red.): *Esperanto - Lingvo kaj Kulturo Berlino: Jubilea Libro 1903 - 2003; Enrigardo, Retrorigardo, Antaŭenrigardo = Esperanto - Sprache und Kultur in Berlin:* Berlin: Esperanto-Ligo Berlino r.A ./ Novjorko- Berlino: Mondial, 367 p., Ill (Beiträge in Deutsch und Esperanto).
- 2007): „100 Jahre Esperanto in Berlin: Historiografische und interlinguistische Fakten in einer neuen Veröffentlichung“. En: Blanke, Detlev (Hrsg.): *Esperanto heute - Wie aus einem Projekt eine Sprache wurde. Interlinguistische Informationen. Beiheft 14,* Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e.V., p. 71-79.
- (2008): „Plansprachen im Archiv der Berlin-Brandenburgischen Akademie der Wissenschaften“. En: Blanke, Detlev (Hrsg.): *Plansprachliche Bibliotheken und Archive. Interlinguistische Informationen. Beiheft 15,* Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e.V., p. 45-56.

(2) Artikoloj en revuoj:

- (1969): „Veranstaltungen der Solidarität mit Vietnam“. En: *der esperantist*, 7-8/1969, p. 35.
- (1984): „La humanisma mesaĝo de Zamenhof – Okaze de la 125-a naskiĝtago de la iniciatinto de Esperanto, 15. 12. 1984“. En: *der esperantist* 6/1984, p. 122 – 125.
- (1985): „La realismo de revulo. Pri la historie optimismaj tendencoj en la pensado de Zamenhof“ En: *PACO – organo de la MEM-sekcio de GDR*, p. 31 – 33.
- (1986a): „Pacrenkontiĝo en Volgograd“. En: *der esperantist*, 3/1986, p. 49 – 51.
- (1986b): „Vivas la spirito de Thälmann“. En: *der esperantist*, 4/1986, p. 73 – 75.
- (1986c): „La korektita Zamenhof – Pri la Zamenhof-kompreno de Ito Kanzi“. En: *PACO – organo de la MEM-sekcio de GDR*, p. 31 – 33.
- (1987a): „Lazar Ludwik Zamenhof – Begründer des Esperanto“. En: *der esperantist*, *Sondernummer* 1987, p. 18.
- (1987b): „La naskiĝa dokumento de Esperanto“. En: *der esperantist*, 6/1987, p. 121 – 127.

- (1987c): „La disputo pri la Zamenhofa heredaĵo“, in: *PACO – organo de la MEM-sekcio de GDR*, p. 33 – 35.
- (1987d): „La Berlinaj esperantistoj kaj la 750jariĝo de Berlin“, in: *PACO – organo de la MEM-sekcio de GDR*, p. 26 – 28.
- (1987e): „Kion ni heredis de Zamenhof?“. En: *Bulgara Esperantisto* 56, Nr. 11, p. 2-3.
- (1988a): „D-rino Soja Zamenhof en GDR“. En: *der esperantist*, 2/1988, p. 39.
- (1988b): „Grava kontribuo al moderna Zamenhofbildo“. En: *PACO – organo de la MEM-sekcio de GDR*, p. 34-36.
- (1988c): „Rückblicke (1) Komenskys ‚Via lucis‘. En: *Die rationelle Sprache – Esperanto-novaĵoj Halle*, Nr. 3.
- (1988d): „Rückblicke (2) Der 4. Esperanto-Weltkongress in Dresden“. En: *Die rationelle Sprache – Esperanto-novaĵoj Halle*, Nr. 4-5.
- (1988e): „Rückblicke (3) Zamenhofs Lingwe Uniwersala“. En: *Die rationelle Sprache – Esperanto-novaĵoj Halle*, Nr. 4-5.
- (1988f): „Rückblicke (4) AEB-Veteranentreffen“. En: *Die rationelle Sprache – Esperanto-novaĵoj Halle*, Nr. 6.
- (1989a): „Rückblicke (5) Interlinguistikseminare in Ahrenshoop“. En: *Die rationelle Sprache – Esperanto-novaĵoj Halle*, Nr. 1.
- (1989b): „Rückblicke (6) Descartes’ Prinzipien einer Universalsprache“. En: *Die rationelle Sprache – Esperanto-novaĵoj Halle*, Nr. 3-4.
- (1989c): „Rückblicke (7) Volapük“. En: *Die rationelle Sprache – Esperanto-novaĵoj Halle*, Nr. 5-6.
- (1989d): „Wilhelm Foerster – eminenta sciencisto kaj esperantisto, in: *PACO – organo de la MEM-sekcio de GDR*, 1989, p. 31 – 35
- (1989e): „Germanlingva libro kun rilatoj al Esperanto“. En: *PACO – organo de la MEM-sekcio de GDR*, p. 24 – 25
- (1989f): „Wachsmann pri la rilato de Albert Einstein al Esperanto. En: *der esperantist* Nr. 1, p. 4.
- (1990b): „D-ro Klauß pensis pri planlingvo – Nepublikigita manuskripto de sciencfikcia romano“. En: *der esperantist* 3, p. 61-62.
- (1990c): „Grava kontribuo al la moderna Zamenhof-bildo“. En: *Bulgara Esperantisto*, Nr.1, p. 9- 11; Nr. 2, p. 10-12.
- (1992a): „Margarete von Waldowski ne plu vivas“ (1.12.1889 – 14.6.1992). En: *Berlina Informilo* 5.
- (1992b): „90 Jahre Esperanto-Gruppe in Berlin“. En: *Esperanto in Berlin*, Nr. 8, Dezember, p. 5 – 6.
- (1993a): „Prof. Adolf Schmidt – der erste Vorsitzende der Berliner Esperanto-Gruppe (1903-1908)“. En: *Esperanto in Berlin*, Nr. 10, p. 7 – 9.
- (1993b): „90 jaroj Esperanto-movado en Berlin – De Jean Borel ĝis la jubilea kunveno en 1993“. En: *Esperanto aktuell* 6, p. 6 – 9
- (1993c): „Esperanto-Autoren und Esperanto-Übersetzer in Berlin 1903-1993“. En: *Esperanto in Berlin*, Nr. 11, Dezember, p. 3 – 8.
- (1993d): „Aus einem Interview mit Prof. John Wells, dem Präsidenten der UEA, vom 12.6.1993 in Rotterdam“. En: *Esperanto in Berlin*, Nr. 11, Dezember, p. 8 – 12.
- (1994a): „Zwischen Geomagnetismus und Esperanto – Zum 50. Todestag des Geophysikers und Esperanto-Pioniers Adolf Schmidt“. En: *Esperanto aktuell* 7, p. 4 – 5.
- (1994b): „Gedanken zum Liga-Jubiläum“. En: *Esperanto in Berlin*, Sonderausgabe 3. Juli, p.1.
- (1994c): „Wilhelm Wittbrodt – der erste Vorsitzende der Esperanto-Liga Berlin (1949-1950)“. En: *Esperanto in Berlin*, Sonderausgabe 3. Juli, p. 4 – 6.
- (1994d): „Eine Esperanto-Schülerin von Wilhelm Wittbrodt erzählt. Aus einem

- Videointerview mit Ilse Verdick, geb. Selchow, Hamburg“. En: Esperanto in Berlin, Sonderausgabe 3. Juli, p. 9 – 12.
- (1994e): „De Jean Borel ĝis urb-unuiĝo: 90 jaroj da movado en Berlino. En: *Esperanto* (Rotterdam) Nr. 1, p. 12-14.
- (1995a): „Wie die Esperantisten 1965 in den Kulturbund kamen – 35 Jahre Esperanto in Ost-Berlin / 50 Jahre Kulturbund“. En: *Kultur news* 3, p. 7 – 9.
- (1995b): “Karl Maier kaj Rudolf Hahlbohm pri Esperanto en Orienta Berlino komence de 60aj jaroj”. En: *Berlina Esperanto-kulturo* 1, Aldono al la Berlina Informilo en marto 1995, Red. Fritz Wollenberg.
- (1995c): “Rudolf Hahlbohm kaj Ludwig Schödl pri Esperanto en Orienta Berlino komence de 60aj jaroj.” En: *Berlina Esperanto-kulturo* 2, Aldono al la Berlina Informilo en aprilo 1995, Red. Fritz Wollenberg.
- (1995d): “Wilhelm Wetekamp kaj la Werner-Siemens-Realgymnasium en Schöneberg. En: *Berlina Esperanto-kulturo* 2, Aldono al la Berlina Informilo en aprilo 1995, Red. Fritz Wollenberg.
- (1995e): “Letero de Margot Kermann pri esperantista vivo en Berlin (precipe Cseh-grupo) komence de 30aj jaroj”. En: *Berlina Esperanto-kulturo* 3, Aldono al la Berlina Informilo en julio 1995, Red. Fritz Wollenberg.
- (1995f): “Intervjuo kun sinjoro Nagase Yoshikatsu pri „eldonejo ludovikito“. En: *Berlina Esperanto-kulturo* 4, Aldono al la Berlina Informilo en septembro 1995, Red. Fritz Wollenberg.
- (1995g): “D-ino Sakaguchi kaj prof. Back pri GIL”. En: *Berlina Esperanto-kulturo* 5, Aldono al la Berlina Informilo en oktobro 1995, Red. Fritz Wollenberg.
- (1995h): “Intervjuo kun Bengt-Arne Wickström, prezidanto de LKK por la 84a UK de Esperanto en Berlin”. En: *Berlina Esperanto-kulturo* 6, Aldono al la Berlina Informilo en decembro 1995, Red. Fritz Wollenberg.
- (1995i): „Provizora LKK por UK en Berlin konstituiĝis“. En: *Berlina Informilo* 12.
- (1996a): “Ina Tautorat kaj Helmut Krone pri unuiĝo de esperantistaj organizoj en Berlin en 1991”. En: *Berlina Esperanto-kulturo* 7, Aldono al la Berlina Informilo en februaro 1996, Red. Fritz Wollenberg.
- (1996b): “Rememoroj de August Franke pri Andreo Cseh en Berlin en 1931”. En: *Berlina Esperanto-kulturo* 8, Aldono al la Berlina Informilo en aprilo 1996, Red. Fritz Wollenberg.
- (1996c): „Hermann D. Tautorat ne plu vivas“. En: *Berlina Informilo* 6.
- (1996d): “Memore al Hermann D. Tautorat” . En: *Berlina Esperanto-kulturo* 9, Aldono al la Berlina Informilo en junio 1996, Red. Fritz Wollenberg.
- (1996e): „Nun decidite: UK 1999 en Berlino“. En: *Berlina Informilo* 9.
- (1996f): “La Ekonomiscienca Fakultato de Humboldt-Universitato de Berlin kaj prelego de Wilhelm Ostwald en 1906 pri Internacia Lingvo”. En: *Berlina Esperanto-kulturo* 10, Aldono al la Berlina Informilo en oktobro 1996, Red. Fritz Wollenberg.
- (1996g): „Unu lingvo por la scienco. Interlingvistika Memorkolokvo por Wilhelm Ostwald en Berlin“. En: *Esperanto aktuell*, Nr.6, p. 11-13.
- (1997a): Der Briefwechsel Wilhelm Ostwalds zu interlinguistischen Problemen. En: *Mitteilungen der Wilhelm-Ostwald-Gesellschaft zu Großbothen e.V.* – Nr. 2/1997, p. 26-44.
- (1997b): “Ni funebras pri Ludwig Schödl (1909-1997)”. En: *Berlina Informilo* 4.
- (1997c): “La informiloj en Berlin”. En: *Berlina Esperanto-kulturo* 11, Aldono al la Berlina Informilo en novembro 1997, Red. Fritz Wollenberg.
- (1997d): „Ostwalds Wirken im Bereich der Interlinguistik“. En: *Chemische Technik* 49 (1997), Nr. 5, p. 263-264.

- (1998): „Das Interlinguistik-Kolloquium für Wilhelm Ostwald: Einführung – Enkonduko – Introduko. En: *Informilo por Interlingvistoj* Nr. 3, p. 16-19 (Ebenfalls in *Interlinguistische Informationen* Nr. 3/1998, p. 12-15.
- (2000): „Ni funebras pri Karl Maier (1901 – 2000)“. En: *Berlina Informilo* 9.
- (2001): „Gratulon al Detlev Blanke“. En: *Berlina Informilo* 7.
- (2002): „ELB restu la tegmenta organizaĵo por berlinaj geesperantistoj!“. En: *Berlina Informilo* 3.
- (2003a): „Aranĝoj en la Jubilea Jaro 2003“. En: *Berlina Informilo* 2.
- (2003b): „Sukcesa omaĝo al Jan Fethke“. En: *Berlina Informilo* 4.
- (2003c): „La vivo de Jan Fethke (193-1980), alinome Jean Forge, filmisto kaj Esperanto-verkisto“. En: *Esperanto aktuell*, Nr. 3, p. 16.
- (2004a): „Karl Maier – vivo inter Ĉinio kaj Germanio“. En: *Berlina Informilo* 7.
- (2004b): „Ni gratulas al profesoro Bociort“. En: *Berlina Informilo* 11.
- (2005a): „Kafejo Multi-Kulti – bunta programo daŭras“. En: *Berlina Informilo* 2.
- (2005b): „Komune por apliko kaj disvastigo de Esperanto – Brandenburgia Esperanto-Asocio kaj Esperanto-Ligo Berlin kunfandiĝis“. En: *Berlina Informilo* 4.
- (2005c): „ELB dankas al Ina Tautorat“. En: *Berlina Informilo* 7.
- (2005d): „D-ro Seán Ó Riain forlasas Berlinon“. En: *Berlina Informilo* 8.
- (2006): „Hussein Al-Amily pri siaj vivospertoj kaj kultura laboro – intervjuo“. En: *Berlina Informilo* 9.
- (2007a): „Treffpunkt Berlin, Esperantoplatz“. En: *Berlina Informilo* 4.
- (2007b): „La ĉina aktivulo Yu Tao vizitis Berlinon“. En: *Berlina Informilo* 6.
- (2007c): „Japanaj esperantistoj kaj Berlin“. En: *Berlina Informilo* 7.
- (2008a): „Berlinaj esperantistoj kore gratulas al Wera Blanke“. En: *Berlina Informilo* 3.
- (2008b): „1908 – decida jaro por Esperanto“. En: *Berlina Informilo* 5.
- (2008c): „Interview mit Ludwig Schödl. Intervjuo kun Ludwig Schödl. Kun endkonduko de Detlev Blanke. (La intervjuon realigis Fritz Wollenberg, tajpis la tekston laŭ la vidbenda teskto Sebastian Hartwig). Berlin: Arbeitsgruppe zur Erforschung der Geschichte des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR (GDREA), 48 p. (Manuskripto).

3.4 Carlo Minnaja - okaze de libro

Oni ne ĉiam devas atendi rondan jubileon por atentigi pri personoj, kiuj donis aparte gravan kontribuon al sciencaj atingoj en Esperanto.

Prof. d-ro Carlo Minnaja (*19.3.1940) apartenas al tiaj personoj.

Ni povus argumenti, ke 2010 li havos rondan jubileon. Krome, en 2005 li havis sian duonrondan jubileon, en la eŭropa kulturo grava dato.

Sed la vera kialo por prezenti lian bibliografion nun estas libro, kiun li verkis pri la itala movado kaj kiu aperis jam en 2007. Pro tio mi kontaktis la aŭtoron. Li rakontis al mi fascinan historion, kiu kuŝas malantaŭ la libro kaj ligiĝas al liaj lastatempaj nekutimaj studoj, nekutimaj almenaŭ por homo kun prestiĝa universitata kaj eksteruniversitata karieroj, homo – mi petas pardonon – ne plu tute juna.

Pro tio mi ne povis rezisti la tenton iom prezenti *Carlo Minnaja*, liajn foje nekutimajn vojojn kaj liajn verkojn (Red.).³

³ Cetere, vidu <http://www.math.unipd.it/~minnaja/>

3.4.1 Pri la persono

Konatas, ke *Carlo Minnaja* devenas el fama itala esperantista familio, kie li edukiĝis kun Esperanto kiel familia lingvo. Li havis multajn esperantistajn funkciojn kaj nuntempe i.a. estas prezidanto de la Padova Esperanto-Grupo. Sed tio ne estas la ĉefa temo por IpI.

Nin unuavice interesu lia scienca kariero:

Carlo Minnaja i.a. estas doktoro pri matematikaj Sciencoj (Universitato de Pisa, 1963), partoprenis trijaran studadon cele al bakalaŭreco (Universitato Ca` Foscari, Venecio, 2006) kaj posedas la diplomon pri instrukapableco de la Itala Esperanto-Instituto (1957).

Aktuale li estas katedra profesoro pri analitiko (Fakultato pri Inĝenierarto, Universitato de Padova, ekde 1980), orda profesoro pri aplikata matematiko (Akademio Internacia de la Sciencoj, AIS, San Marino ekde 1989) kaj profesoro h.c. (honoris causa) pri aplikata matematiko (Fakultato pri Humanistiko kaj Artoj, Universitato "Lucian Blaga", Sibiu-Hermannstadt (Rumanio, ekde 2003).

Liaj specialaj taskoj ĉe la Universitato de Padova: Estro de la Padova Grupo por traktado de Natura Lingvaĵo; Membro de kelkaj sciencaj, instruaj kaj organizaj komitatoj.

Ĉe AIS San Marino li estas vicprezidanto (ekde 2000), Senatano, Vic-dekano de la Sekcio pri Struktursciencoj.

La specialaj intereskampoj de prof. Minnaja estas matematika lingvistiko, komputa lingvistiko, traktado de natura lingvaĵo, maŝintradukado, planlingvoj (precipe Esperanto).

Li krome estas prezidanto de la Internacia Scienca Instituto "Ivo Lapenna", Wien (ekde ĝia fondiĝo en 1997), membro de la Akademio de Esperanto, Rotterdam (ekde 1973; Estro de la Komisiono pri Historio ekde 2002; Direktoro de la Literatura Sekcio 1996-2002); membro de la redakta komitato de "Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft"; referanto por kelkaj internaciaj revuoj kaj internaciaj kongresoj pri komputa lingvistiko, kibernetiko kaj planlingvoj; membro de Organizaj Komitatoj de diversaj sciencaj kunvenoj; kunsidestro en sciencaj kunvenoj ktp. Cetere, li ankaŭ estas membro de Amnesty International kaj de Itala Asocio pri Esploroj pri Kancero.

Por sia scienca kaj kultura agado prof. Minnaja ricevis kelkajn distingojn, i.a. la "Premion de la Kulturo" de la Itala Ĉefministro (1990).

3.4.2 Historio pri libro

Mankas al ni superrigardaj libroj pri la historio de Esperanto en unuopaj landoj. Carlo Minnaja liveris al ni sekvindan ekzemplon. Jen ĝi:

Minnaja, Carlo (2007): L'Esperanto in Italia. Alla ricerca della democrazia linguistica Presentazione di Ricciarda Ricorda. Padova: IL Poligrafo, ISBN 978-88-7115-546-3, 225 p.

Jen sekvas lia tre persona teksto pri nekutima historio:

“Alveninte al pli ol sesdekjariĝo mi decidis, ke mankas al mi ankoraŭ malmulto por vivi, kaj do mi fine sekvis mian grandan sopiron universitate diplomigi pri beletro. Mi iris al la universitato de Venecio (40 km de Padova) elektis la fakon "historio" kaj tute humile kaj obeeme iĝis denove studento, blankhara inter dudekjaruloj, kiuj tamen min akceptis kiel normalan samkursanon. Ni helpis unu la alian, ili havis pli bonan memorkapablon ol mi, mi

kapablis multe pli bone verki, preni notojn kaj koncizigi ol ili. Alveninte al la fina trijara diplomiĝo, mi devis elekti disertacian titolon. Mi estis sekvinta kurson pri nuntempa itala poezio, pri kiu cetere mi spertis kiel redaktoro kaj ĉefa tradukinto de la antologio "Enlumas min senlimo" aperinta ĉe LF-koop en 1990 kun granda, diskreta kaj malavara helpo de Perla.

Nuntempa itala poezio estis la specialaĵo de mia unua (mortinta) edzino, kiu vere enkondukis min laikon en tiun fakon, kaj mian tutan kompetenton pri tiu fako mi dankas al ŝi. Mi hezitis pri temo de la disertacio kiun mi proponu al profesoro; mi demandis, ĉu eblas diplomiĝi pri historio per disertacio pri literaturo, oni diris al mi ke jes, do mi decidis diplomiĝi per disertacio pri nuntempa itala poezio. Mia dua edzino, ne e-istino, sed sindone apoganta ĉiujn miajn esp-aĵojn, de la vortaro al la eseoj, instigis min proponi temon pri miaj tradukoj al Eo, dirante: "Vi pleje kapablas en tio". Mi iom timeme iris al la profesorino pri nuntempa itala literaturo, ĝuste *Ricciarda Ricorda*, kun mia antologio kaj diris "mi kapablas ion verki pri ĉi tiu temo". Ŝi rimarkis, ke mi pro la verkado de tiu antologio posedis privatajn leterojn de la italaj poetoj de mi kontaktitaj, do dokumentojn kiujn neniu konis, kaj estis entuziasma pri la ideo iĝi mia referantino. Mi diplomiĝis "summa cum laude" (180 studunuoj, trijara studado, do egala al bakalaŭro, itale ĝi nomiĝas "laurea triennale") per disertacio "Unu jarcento da tradukoj el la itala literaturo al Esperanto (1890-1990)".

La referantino poste insistis, ke mi ampleksigu la laboron kaj verku libron pri Eo en Italio, reduktante la literaturan parton kaj verkante tute novan pri la movado; ŝi urĝis min, ke mi tion faru dum tri semajnoj por povi prezenti ĝin al la fakultato cele al publikigo fare de la fakultato inter la originalaj esploroj. Mi laboris tagnokte, iris al Milano al la arkivo de la Itala E-Federacio, konsultis klerajn kaj sindonajn amikojn (*Silfer, Haupenthal, Carlevaro, Foessmeier*) kaj akuŝis la libron; la referantino prezentis ĝin al la fakultato kun multaj laŭdoj por publikigo. La fakultato petis ekspertizon de eksterulo, kaj la afero iĝis do eĉ tro facila, ĉar la eksterulo elektita estis *Fabrizio Pennacchietti*, kiu kompreneble diris, ke la verko estas mirindaĵo....El mia universitata studado sekvis tamen ankoraŭ kelkio. Iu profesoro pri slava historio estis proponinta, ke por lia ekzameno la kandidatoj verku disertacieton laŭ temo laŭplaĉa, kongrua al la ĉeftemo de la kurso. Mi elektis temon "Hebreismo kaj Esperanto en la orienteŭropaj landoj". Tio ege plaĉis al li, kaj li mem prezentis mian referaĵon al slavologia itala esplora revuo, kiu publikigis ĝin.

Dua afero. Iu profesoro pri nuntempa itala historio, kunreferanto pri mia disertacio kaj kunredaktoro de revuo pri historio de la Venecia regiono, proponis, ke mi verku artikolon specifan pri Esperanto en la regiono, kaj do antaŭ la fino de la jaro aperos en tiu revuo dekpaĝa artikolo pri "Esperanto en Venetio".

Tria afero. Mia referantino, leginte en mia disertacio pri la tradukoj el *Goldoni* al Eo (mi mem tradukis "La gastejestrinon") kontaktigis min kun alia kolegino, kiu specife interesiĝas pri Goldoni, kaj tiu petis min, ke mi verku artikolon pri Goldoni en la internaciaj lingvoj (estas bela traduko en Interlingua+Occidental de *Tazio Carlevaro* de "La familio de la antikvaĵisto" kaj same traduko de "La gastejestrino" en Interlingua). Do ĉe la komenco de la venonta jaro aperos mia artikolo en specifa revuo pri Goldoni. Mi rimarkis, ke la interesiĝo pri la fenomeno "Esperanto" estas multe pli granda ol ni e-istoj supozas.

Lastaĵo: Ĉio ĉi okazis dum mi regule kursadis en mia universitato pri matematiko, kaj antaŭenportis sciencajn esplorojn pri matematiko (fakte pri matematika terminologio en la internaciaj lingvoj). Estis tagoj en kiuj mi motorciklis matene frue al la stacidomo de Padova, trajnis al Venecio, aŭskultis studenteĉe kvar horojn da lekcioj, feliĉa, ke mi devas nur aŭskulti, ree kuris al la stacidomo de Venecio (dek pontoj), trafis trajnon al Padova, kaj

motorciklis rekte al la prelegejo, kie mi posttagmeze lekciis kvar horojn en du malsamaj kursoj... Tempon por tagmanĝi mi ne havis, ne gravas. Vespere-nokte mi ordigis miajn studentajn notojn kaj, simetrie, pretigis la profesorajn lekciojn por la posta tago. En Venecio neniu sciis pri mia profesio, mi estis tie absoluta inkognito. Nur post la diplomiĝo mi diris al la referantoj, ke mi estas ... kolego.

Nur pensu, ke ĉio ĉi naskiĝis el mia ideo bakalaŭriĝi pri historio, iel por omaĝi al mia mortinta edzino, kiu estis beletristino, kaj al mia mortina filino, kiu revis studi ĉe la universitato de Venecio.”

3.4.3 Bibliografio

La listo de la verkaro de Carlo Minnaja estas tre ampleksa. Troviĝas sur ĝi 150 tekstoj pri aplikata matematiko, komputa lingvistiko, homa kaj maŝina tradukado, planlingvoj, literatura kritiko en planlingvoj, historio; kelkaj dekoj da tradukoj el la angla al la itala kaj de la latina, franca, itala, venecia kaj italaj dialektoj al Esperanto.

Ni prezentos elekton de liaj verkoj, kiun li akceptis kaj kiu proksimume laŭas al la (antaŭ?)lasta redaktaĵo de lia retprezentiĝo.

(<http://www.math.unipd.it/~minnaja/index.html.eo>).

3.4.3.1 Elektitaj libroj:

Kiel aŭtoro:

2007. L'esperanto in Italia. Padova, Il poligrafo, paĝoj 225.

2006. Elektitaj lekcionoj pri historio de scienco kaj tekniko (kun A. Ŝejpak). Moskvo, MGIU, paĝoj 250.

1997-2002. Metodi Matematici per l'Ingegneria (2 volumoj). Padova, Progetto, paĝoj 292+346.

1996. Vocabolario Italiano-Esperanto. Milano, CoEdEs, paĝoj 1448.

1994. Matematica Due. Padova, Decibel-Zanichelli, , paĝoj viii+456.

1993. Matematica per Ingegneria, Problemi ed esercizi - 2: Spazi di Hilbert - Serie di Fourier –Trasformate - Distribuzioni (2a ed.). Padova, Progetto, paĝoj 162.

1993. Metodi matematici. Rende, CUD, paĝoj 186.

1991. Argomenti di Matematica per Ingegneria. Padova, Progetto, paĝoj 270.

Kiel redaktoro

1998. AI*IA98, Atti del Sesto Convegno dell'Associazione Italiana per l'Intelligenza Artificiale (kun S. Badaloni), Progetto, paĝoj 336.

1997. R. Selten: "La kostoj de Europa Lingva (ne-)Komunikado" (scienca kunordiginto), ERA, , paĝoj 150.

1991. Ja. O. Matvijiŝin: "La cultura e la scienza, con particolare riguardo alla matematica, nei rapporti tra Italia e Ucraina", Dip. Matematica Pura ed Appl., Univ. Padova, R. I. 21, paĝoj 128.

1990. Modellizzazioni Matematiche per le Scienze del Linguaggio, Dip. Matematica Pura ed Appl., Univ. Padova, R. I. 25, paĝoj 109.

(jaro?) Metodologie numeriche per la soluzione di equazioni differenziali della idrologia e della idraulica (kun G. Casadei, G. Di Silvio, G. Gambolati), Pàtron, paĝoj 288.

1980. R. Hilgers, Yaŝovardan (eds.): EG-Wörterbuch mathematischer Begriffe, Leuchturn-Verlag, p. 133-141.

3.4.3.2 Elektitaj artikoloj (ekde 1990)

Artikoloj aperintaj en specifaj monografiaj volumoj:

2006. "Un poeta in Esperanto: Edmond Privat", en P. G. Borbone, A. Mengozzi, M. Tosco (red.): *Loquentes linguis*, Wiesbaden, Harrassowitz, p. 509-514.
2006. "Bruno Migliorini en la Esperanta kulturo", en B. Migliorini: *Lingvaj aspektoj de Esperanto*, Pisa, Edistudio,
- 2005-2006. "Joseph Fourier, matematico della Rivoluzione", in L. Giacardi, M. Mosca, O. Robutti (red.), *Conferenze e Seminari dell'Associazione Subalpina Mathesis*, p. 175-189.
1997. "Machine Translation: an Aid, not a Solution", in R. Selten (ed.): *The Costs of European Linguistic (non) Communication*, ERA, p. 67-75.
1993. "Qualche applicazione matematica alle scienze del linguaggio" (kun L. Paccagnella), *Epistemologia*, XVI, Fascicolo Speciale, p. 215-240.
1992. "Lingua ed educazione matematica", en G. Pisent, L. Bottin (red.): *Scuola e processi formativi*, Progetto, p. 107-116.
1991. "An Example of Parallelism in reversing Multilingual Dictionaries" (kun L. Paccagnella), en "Computational Lexicology and Lexicography", *Ling. Comp.*, VII, p. 139-145.
1991. "La metodologia delle catastrofi negli studi di fonetica", en E. Magno Caldognetto, F. Ferrero (red.): "Trattamento del segnale vocale ed elaborazione statistica dei dati", *Atti Assoc. It. Acustica*, XVIII, p. 133-147.

Artikoloj aperintaj en revuoj aŭ aktoj

2007. "Scientific Dictionaries in the International Language", *Sbornik radova "Ugolas i snačaj nauke u cavremenom društvu*, Dec., p. 1-9.
2007. "Giuseppe Peano e Louis Couturat sullo sfondo della lingua internazionale", *Language Problems and Language Planning*, 31, 3, 2007, p. 281-289.
2007. "Parola kulturo, de Zamenhof ĝis Lapenna", *Literatura Foiro*, 38, 228, p. 214-217.
2007. "Matematikaj vortaroj de Ceretti ĝis Wordnet", *Aktoj de FIHUSO 2007*, presata.
2007. "Italoj literaturas (4)", *Literatura Foiro*, 38, 227, p. 158-159.
2007. "Leteroj de du interlingvistoj en la komenco de la dudeka jarcento", *Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft*, 48, 1, März 2007, p. 15-20.
2007. "Italoj literaturas (3)", *Literatura Foiro*, 38, 226, p. 103-107.
2007. "Goldoni post tricent jaroj", *Literatura Foiro*, 38, 225, p. 5-12.
2006. "Italoj literaturas (2)", *Literatura Foiro*, 37, 224, p. 294-298.
2006. "Italoj literaturas (1)", *Literatura Foiro*, 37, 223, p. 245-250.
2006. "Ĉiu havas sian guston", *Literatura Foiro*, 37, 221, p. 137.
2005. "Ebraismo ed Esperanto nell'Europa dell'Est", *Slavia*, XIV, 4, 2005, p. 18-55.
- 2004-05. "Il problema delle due culture negli inediti di Ubaldo Richard" (kun A. Bresquar), *Atti e Memorie dell'Accademia Galileiana di Scienze, Lettere ed Arti, CXVII (2004-2005)*, Parte II, p. 137-167.
- 2004-05. "Considerazioni sull'origine e sull'etimologia della parola 'simplesso'. Cronistoria di una 'quête'" (kun A. Lepschy), *Atti e Memorie dell'Accademia Galileiana di Scienze, Lettere ed Arti, CXVII (2004-2005)*, Parte II, p. 35-55.
2005. "«Simplesso». Indagine sull'etimologia e sulla datazione di un termine matematico" (kun A. Lepschy), *Lingua e stile*, XV, 1, giugno 2005, p. 91-103.

- 2004-05. "Considerazioni sull'origine e l'etimologia della parola «simplesso» - Cronistoria di una «quête»", *Atti e Memorie dell'Accademia Galileiana di Scienze, Lettere ed Arti*, CXVII (2004-2005), Parte II, p. 71-93.
2004. "Considerazioni a proposito della cosiddetta funzione di Dirac" (kun A. Lepschy), *Atti e Memorie dell'Accademia Galileiana di Scienze, Lettere ed Arti*, CXVI (2003-2004), Parte II, p. 71-93.
2002. "Anaphora with relative pronouns: An Algorithm for Italian and Esperanto. Part II" (kun L. Paccagnella), *Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft*, 43, 3, Sept. 2002, p. 115-124.
2002. "Anaphora with relative pronouns: An Algorithm for Italian and Esperanto. Part I" (kun L. Paccagnella), *Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft*, 43, 2, Juni 2002, p. 51-61.
2002. "Etimologia in una lingua pianificata", *Language Problems and Language Planning*, 26, 1, 2002, p. 69-75.
2001. "The Language of Computers: between Culture and exact Science", *The Prometheus Journal*, 2001, n.1, p.1-9.
2001. "Gerolamo Cardano e l'insegnamento dell'aritmetica (nel 500° anniversario della nascita)", *Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft*, 42, 4, Dez. 2001, p. 166-180.
2000. "Diritto alla lingua e ... alla scienza", *Cadmo*, VIII, n. 3 (24), 2000, p. 113-115.
2000. "A Part-of-Speech Tagger for Esperanto oriented to MT" (kun L. G. Paccagnella), *International Conference "MT 2000 - Machine Translation and multilingual Applications in the new Millennium"*, Exeter, 2000, p. 13.1-13.5.
2000. "Sigmund Freud kaj la naskiĝo de la psikanalizo" (Sigmund Freud and the Birth of Psychoanalysis), *Acta Sanmarinensia Academiae Internationalis Scientiarum*, V, 4, 2000, p. 89-148.
2000. "Statistika analizo de la paroladoj de Ivo Lapenna" (Statistical Analysis about Speeches by Ivo Lapenna), *Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft*, 41, 2, Juni 2000, p. 83-90.
1998. "Information Extraction: a Scheme Automatically extracted from a School Text" (with L. G. Paccagnella), in S. Badaloni, C. Minnaja (eds.): *AI*IA98, Atti del Sesto Convegno dell'Associazione Italiana per l'Intelligenza Artificiale*, Progetto, Padova, 1998, p. 32-36.
1998. "Lingvoproblemoj en Eŭropo: ekspertizo pri la kostoj de nekomunikado - Language Problems in Europe: an Expertise about the Costs of non-Communication", *Act. 15e Congr. Int. Cybernétique*, Namur, 1998, p. 695-700.
1998. "Standardoj por la aŭtomata etikedado de la parolelementoj - Standards for automatic Part-of-Speech Tagging", *Act. 15e Congr. Int. Cybernétique*, Namur, 1998, p. 745-750.
1998. "Ambiguity and Hypergraphs", *Cybernetica*, 41, 1, 1998, p. 49-56.
1997. "Maŝintradukado: helpilo, ne solvo", en R. Selten: "La kostoj de Europa Lingva (ne-) Komunikado", ERA, 1997, p. 65-73.
1996. "Machine Translation in the European Union", *Proc. 3° Congr. SIMAI*, Roma, 1996, p. 235-238.
1995. "Università di Padova", in *Atti del convegno di studio su "Il Diploma nelle Facoltà di Ingegneria: L'insegnamento della Matematica*, 1995, Unione Matematica Italiana, p. 27-30.
1995. "Aŭtomata skemigo de lernejoj tekstoj - Automatic Schematization of School Texts", *Act. 14e Congr. Int. Cybernétique*, Namur, 1995, p. 782-786.
1995. "Special Dictionaries for Machine Translation" (kun L. Paccagnella), *Act. 14e Congr. Int. Cybernétique*, Namur, 1995, pgs. 771-776.

1994. "Universitatoj de Alp-Adrio enkadre de unuiginta Eŭropo - Università di Alpe Adria nel quadro dell'Europa unita", 6a Conf. Esperantisti Alpe Adria, Trieste, 1994, p. 47-58.
1993. "Traduzione automatica e intelligenza artificiale" (kun L. Paccagnella), Sistemi Intelligenti, V, 1, 1993, p. 85-119.
1991. "La metodologia delle catastrofi negli studi di fonetica", Dipartimento di Mat. Pura Appl., Preprint 4, 25.2.1991.

3.4.3.3 Recenzoj (ekde 1990)

2000. E. Coelho: "Teaching and Learning in Multicultural Schools: An Integrated Approach", Language Problems and Language Planning, 24, 2, 2000, p.201-204.
1994. R. Köhler and B. R. Rieger: "Contributions to Quantitative Linguistics", Computational Linguistics, 20, 1, 1994, p. 141-142.
1991. R. Zepp: "Language and Mathematics Education", Language Problems and Language Planning, 18, 1, 1991, p. 88-90.

3.4.3.4 Elektitaj literaturaj tradukoj (ekde 1980)

- 2006-07. L. Pirandello: La jaro, 2006, Heroldo de Esperanto, 2007, 1 (2009), p. 3.
2006. N. Machiavelli: La princo, 2006, Milano, F.E.I., p. 104.
2001. G. Cardano: Pri la noblo kaj utilo de ĉi arto kaj pri la malklaraj notacioj (de "De numeris", de la latina al Esperanto), Literatura Foiro, 194, 2001, p. 291.
2000. G. Leopardi: Dialogo de Modo kaj Morto (de la itala al Esperanto), Literatura Foiro, 187, 2000, p. 245-247.
1999. G. Casanova: el "Historio de mia vivo" (de la franca al Esperanto), Literatura Foiro, 178, 1999, p. 80-86.
1992. C. Pascarella: La malkovro de Ameriko (kvindek sonetoj el la Roma dialekto al Esperanto, kun R. Corsetti kaj G. Pisoni), Literatura Foiro, 140, 1992, p. 301-319.
1990. Enlumas min senlimo (Antologio de la itala poezio de la 20a jarcento tradukita al Esperanto) (red.), Literatura Foiro, 1990, p. 272.
1990. A. Beolco (Ruzante): Interparolo (el la Padova dialekto de la 16a jarcento al Esperanto), Edistudio, 1990.
1982. C. Pavese: Poemoj (el la itala al Esperanto), LF-koop, 1982.
1981. C. Goldoni: La gastejestrino (el la itala al Esperanto), Edistudio, 1981.

3.4.3.5 Elektitaj literaturaj libroj, eseoj aŭ recenzoj (ekde 1990):

2005. Ebraismo ed esperanto nell'Europa dell'Est, Slavia, XIV, 4, pp. 18-53.
2002. Du akademioj kune, Monato, 23, 1, p. 26 [recenzo pri "Lingva planado kaj leksikologio" de G. Mattos kaj Ch. Kiselman (red.)].
2002. La unua jaro de kelkaj literaturaj revuoj, Literatura Foiro, 200, p. 285-291.
2002. Baza Esperanta Radikaro, Monato, 23, 7, p. 24 [recenzo pri "Baza radikaro oficiala" de W. Pilger].
2002. UEA en la sepdekaj jaroj, Monato, 23, 11, p. 28-29 [recenzo pri "Universala Esperanto-Asocio en la periodo 1970-1980" de Perspektivo (red.)].
2002. Vojaĝo en Esperanto-lando, Heroldo de Esperanto, 78, 13 (2025), p. 3 [recenzo de la samtitola verko de B. Kolker].
2001. Ne konkludo, sed komenco, Literatura Foiro, 189, p. 13-16 [recenzo pri "Gaston Waringien" de A. Cherpillod].

2001. Eseoj memore al Ivo Lapenna, *www.kehlet.com*, 418 paĝoj (redaktoro kaj aŭtoro de kvar eseoj).
2001. Purgatorio fine paradizas, *Literatura Foiro*, p. 260-263 [recenzo pri "Purgatorio" de D. Aliĝieri, tr. E. Dondi].
2001. Gerolamo Cardano, *Literatura Foiro*, 194, p. 290.
2001. Post dudek tri jaroj, *Monato*, 22, 9, p. 29 [recenzo pri "Havenoj" de M. Nervi].
2001. Spirokapta historia fresko, *Monato*, 22, 12, p. 28 [recenzo pri "La Duakanonaj Libroj", vol. 1, tr. G. Berveling].
1999. La konflikto ata-ita, *Literatura Foiro*, 177, p. 30-39.
1999. La Akademio de Esperanto jubileas, *Fonto*, 209, 1998, p. 5-11.
1999. Casanova kiel eŭropano, *Literatura Foiro*, 178, p. 75-79.
1999. Slango: ĉu vere poezio de la ĉiutaga vivo?, *Literatura Foiro*, 180, p. 208-210 [rec. pri "Slango kaj ĵargono en esperanto" de W. Pilger].
1999. Indaj jubileaj kontribuoj, *Esperanto*, 1118, p. 172-173 [recenzo pri "Lingva arto" de V. Benczik (red.) kaj "75 jaroj" de W. Auld].
1998. Vortaro Itala-Esperanto: la longa vojaĝo de unuopulo, en: R. Haupenthal (red.), *Menade bal, pŭki bal, Iltis*, p. 219-232 [historio de la itala-esperanta vortaro].
1997. La saggezza dei popoli e la lingua internazionale (La saĝo de la popoloj kaj la internacia lingvo), *L'esperanto*, 28, 8, p.14-16.
1997. Maŝintradukado: helpilo, ne solvo; en R. Selten (red.): *La kostoj de la Eŭropa lingva (ne-)komunikado (sciencia kunordigo de C. Minnaja)*, *Esperanto Radikala Asocio*, p. 65-72.
1997. Vasta spektro de kompetentoj, *Literatura Foiro*, 166, p. 101-103 [rec. pri "Po - la diabla vorto" de A. Cherpillod].
1996. Ne ofte okazas ke la Muzoj parolas, *Literatura Foiro*, 159, p. 49-51 [rec. pri "La Muzino" de R. Ŝulco].
1996. Lule sur "La Ondo de Esperanto", *Literatura Foiro*, 160, p. 63-66 [rec. pri fruaj prozaĵoj de Payson, Saĥarov, Ŝirijaev].
1996. Infana raso kvardek-jara, *Literatura Foiro*, 164, p. 287-291.
1996. Tra lupeo filozofa kaj lingvista, *Esperanto*, 1083, p. 133 [rec. pri "La serĉado de la perfekta lingvo en la eŭropa kulturo", de U. Eco, tr. D. Mistretta].
1996. Atende en la senfina tempo, *Esperanto*, 1086, p. 194
1995. Nur tiu ne eraras, kiu neniam ion faras, *Literatura Foiro*, 156, p. 203-205 [eseeto pri leksikologio].
1995. Tri tagoj de arto eterna, *Literatura Foiro*, 158, p. 293-298 [recenzo pri "Dekamerono"]. [rec. pri "La dezerto de la tataroj" de D. Buzzati, tr. D. Mistretta].
1994. Tedas min la vortolisto, *Literatura Foiro*, 149, p. 143-152 [eseo pri vortaristaj principoj].
1993. Ne plu lingveto, *Heroldo de Esperanto*, 1875, p. 4 [rec. pri "Grand Dictionnaire Français-Espéranto" de J. Le Puil - J. P. Danvy (red.)].
1992. Ho Majstro mia, klera kaj homa!, *Heroldo de Esperanto*, 1854, p. 1 [nekrologa eseo pri G. Waringhien].
1992. Sorĉa verssonoro, *ILTIS-forumo*, 2, p. 59-61 [rec. pri "Hermano kaj Doroteo" de Goethe, tr. B. Küster].
1992. Cesare Pascarella, la dialekta poeto, *Literatura Foiro*, 140, p. 297-301.
1992. Impona prezento de kontinueco kaj evoluo, *Esperanto*, 1041, p. 172-173 [rec. pri "Fundamenta Krestomatio de la lingvo Esperanto", 18-a eld.].
1991. Maleblas resti egaldistanca, *ILTIS-forumo*, 1, p. 32 [rec. pri "Letero el Palestino" de S. Alba, tr. G. Kamaĉo].
1990. Nia ŝuldo al Herbert Mayer, *Literatura Foiro*, 124, p. 21-23 [rec. pri fruaj broŝuretoj de Borovko, Wasniewski, Payson].

1990. Piĉ estas poeto, ILTIS-forumo, 3, 76-78.

1990. Phillips, E. G. (el la angla al la itala): Funzioni di una variabile complessa, Cremonese, 1967.

3.5 Dalibor Brozović

Nikola Rašić

3.5.1 Omaĝe al granda kroata lingvisto

En la jaro 2007 la Universitato de Zadar omaĝis al sia iama profesoro okaze de lia 80-jariĝo per scienca simpozio. Akademiano *Dalibor Brozović*, estas prezidanto de Kroata Esperanto-Ligo ekde 1992, naskiĝis en Sarajevo en 1927 kaj esperantistiĝis en 1948.

Nikola Rašić, kroat-nederlanda lingvisto, estis invitita de la organizinto *prof. Josip Lisac* kontribui al la simpozio per aparta temo, celanta prezenti la agadon de Dalibor Brozović sur la kampoj esperantologia kaj interlingvistika. Nepovinte mem ĉeesti kaj prezenti la temon, Nikola Rašić verkis ampleksan kontribuon pri la temo, kun esperantlingva resumo. La teksto ampleksas sepdek tajpitajn paĝojn kaj aperos en proksima tempo en la festlibro honore al Dalibor Brozović. La kroatlingva verko de Rašić portas la titolon Lingvisto kun aparta misio – Dalibor Brozović kiel interlingvisto, esperantologo kaj esperantisto.

Brozović akiris internacian renomon kiel slavisto kaj aperigis centojn da sciencaj verkoj kaj plurajn gravajn librojn pri fonologio, tipologio, dialektologio, lingva geografio kaj teorio de normlingvoj.

Lia plej grava kontribuo tamen estas en la kampo de lingvoplanado kaj lingvopolitiko, precipe en la sudslava kaj balkana lingva medio. Li estas LA ĉefa figuro de kroata lingvoplanado kaj protagonisto de plurjardeka batalo por la defendo de kroata lingva aŭtonomio ene de la serbo-kroata lingva komplekso; cetere lingva sistemo ene de kiu evoluis du variantoj de normlingvo: kroata kaj serba, kun montenegra kaj bosna kiel transiraj variaĵoj. Brozović estas specialisto ĝuste pri tiu temo en sociolingvistiko: lingvoj kun plurcentra normigo.

Li verkis kaj publikigis en multaj lingvoj, ankaŭ en Esperanto. En Esperanto li verkis originalan poezion kaj tradukojn, sed li plej famas pro siaj lingvistikaj studoj, interalie pri litovaj influoj en Esperanto, pri slavaj elementoj en Esperanto kaj – eble la plej konata kaj influa – pri la pozicio de Esperanto en lingva tipologio. Li ankaŭ verkis pri interlingvistiko ĝenerale, ekz. pri la unua interslava lingvisto kaj unu el la unuaj aposterioraj lingvoplanantoj, kroato *Juraj Križanić*. Ruslingve aperis tre grava studo de Brozović pri *Jan Baudouin de Courtenay*, pioniro de interlingvistiko. Ĉio-ĉi certigis al Brozović firman kaj gravan lokon en esperantologio kaj interlingvistiko.

Liaj sciencaj verkoj tiukampe ne multnombros sed ja esence gravas. Indus traduki liajn ne-Esperantlingvajn verkojn (kroat- kaj ruslingvajn) kaj aperigi ilin en unu volumo, kaj eble eĉ prepari kroatlingvan volumon interlingvistikan, konsiderante ke lia interlingvistika laboro metas lian tutan lingvistikadon en apartan perspektivon.

La gvidmotivo de ampleksa studo de Rašić estas la ideo ke Brozović ne estus tia slavisto kaj kroatisto se li ne estintus esperantisto. Esperanto formis la bazajn konturojn de tiu ĉi granda figuro de moderna lingvistiko. La studo de Rašić estas en tiu senco kompleta kaj plenigas la mankon de kono pri tiu aspekto de faka agado de Dalibor Brozović por la kroata lingvistika

publiko. Konsiderante ke temas pri unu el la plej grandaj figuroj de kroata lingvistiko entute, tre gravas ke lia esperantologia verkaro ne estu preteratentita.

3.5.2 Resumo de festlibra artikolo

Lingvisto kun aparta misio:

Dalibor Brozović kiel interlingvisto, esperantologo kaj esperantisto

En tiu ĉi laboraĵo oni celas prezenti la agadon kaj kontribuon de Dalibor Brozović sur la kampo de interlingvistiko kaj esperantologio.

Esperantologie plej gravas liaj meritoj pri la pozicio de Esperanto en lingva tipologio.

En sia verko *Pozicio de Esperanto en lingva tipologio* Brozović ekzakte kaj senambigue konfirmas la tezon pri la aglutina karaktero de la morfologia strukturo de Esperanto kaj difinas ĝian pozicion rilate aliajn lingvotipojn (situante ĝin inter la aglutinajn kaj fleskiajn/fandajn lingvojn). En tiu ĉi verko li ankaŭ prezentas sian intelekte tre stimulan ideon pri la t.n. duonafiksoj en Esperanto.

En sia artikolo *Pri la slavaj elementoj en Esperanto* li konvinke montras ke la slavaj elementoj estas pli ampleksaj ol oni kutime emas pensi. Ili manifestiĝas je diversaj niveloj: grafisma kaj fonologia (grave), leksika (malpli grave), sintaksa kaj semantika (tre funde). Slavbaltaj modeloj signife rekoneblas ankaŭ ĉe iuj morfologiaj kaj morfosintaksaj solvoj en Esperanto; ekzemple je konstruo de sistemo de t.n. korelativoj kaj serio de aktivaj kaj pasivaj participoj. Same iuj vortfaraj afiksoj kaj vortfaraj modeloj estas sendube slavdevenaj kaj esence slavaj estas diversaj gravaj gramatikaj konceptoj (ekz. la verba aspekto) kiuj grave influas la “lingvan spiriton” de Esperanto.

En sia verko *Zamenhof kaj la litova lingvo* li okupiĝas pri eventualaj litovaj influoj en estiĝo de Esperanto, kio ja restas malferma kaj kontroversa temo en esperantologio. En siaj du interlingvistikaj verkoj Brozović analizas la rolon de du slavoj, *Jan Baudouin de Courtenay* kaj *Juraj Križanić*. La unuan oni povas konsideri fondinto de interlingvistiko kiel scienca disciplino, dum la dua estas unu el la unuaj praktikaj interlingvistoj (Brozović lokas lin inter Comenius kaj Leibniz) kaj unu el la unuaj aŭtoroj de aposterioraj interlingvistikaj projektoj (en tiu ĉi kazo: interslava lingvo).

Oni koncize prezentas ankaŭ aliajn verkojn de Brozović pri la interlingvistika teorio ĝenerale kaj pri la lingva politiko en internaciaj rilatoj. Fine, oni atentigas pri la agado de Brozović kiel esperantisto. Estas malpli konate ke Brozović en Esperanto rolas ankaŭ kiel originala poeto kaj tradukanto de poeziaĵoj el la kroata kaj makedona lingvoj. Tri siajn verkojn pri la makedonaj temoj Brozović verkis originale en Esperanto. En tiu ĉi artikolo ni volas montri ke la esperantologiaj kaj interlingvistikaj intereso de Dalibor Brozović ne estas io izolita sed ke ili kongruas kun la tuto de lia scienca opuso ene de kiu apartan lokon okupas lingvoplanado kaj lingvopolitiko, sed ankaŭ en la tuton de lia mondkoncepto.

Jen la resumo de artikolo. Ni nun atendas la aperon de la festlibro mem kaj raportos pri ĝi.

3.5.3 Esperantologiaj kaj interlingvistikaj verkoj

1959: Pri la fontoj de Esperanto. Zamenhof kaj la litova lingvo. Nuntempa Bulgario, Nr.1, p. 10-11

1959b: Denove pri la fontoj de Esperanto. Zamenhof kaj la litova lingvo. Nuntempa Bulgario, Nr.12, p. 40.

1976: Pozicio de Esperanto en lingva tipologio. Lingvistika simpozio Kumrovec – 1975, p. 33-81, Internacia Kultura Servo, Zagreb. (redaktis: Z. Tišljarić)

1977: O mjestu esperanta u lingvističkoj tipologiji. Zbornik radova međ. lingvističkog simpozija Kumrovec – 1975, p. 1-59, Zagreb.

- 1984: Lingva aspekto de internacia komunikado. Tempo. Nr. 1-2, p. 4-5.
- 1986: Jezični aspekt međunarodnog komuniciranja. Jezik i međunarodno komuniciranje, p. 139-146. Savez za esperanto BiH. Sarajevo.
- 1989: Jan Bodyen de Kurtene - pioner naučnog podchoda k problemam interlingvistiki. U: Rieger, Janusz; Urbanczyk, Stanisaw; Szymczak, Mieczysaw (red.): Jan Niecisław Baudouin de Courtenay a lingwistyka światowa. Materiały z konferencji międzynarodowej. Polska Akademia Nauk, Warszawa, 4-7.IX.1979, p. 367-376.
- 1992: Ŝtonetoj unikaj kaj neanstataŭigeblaj. Intervjuo kun Dalibor Brozović. Esperanto 85(1992), 6, p. 104-105. Rotterdam.
- 1996: Juraj Križanić -jedan od pionira interlingvistike. Križanićev doprinos slavenskoj filologiji. Znanstveni skup u povodu 300. obljetnice smrti Jurja Križanića, JAZU, GZH, Zagreb p. 71-76
- 1997: Esperanto fine de la dua jarmilo, Tempo XI, 1997, 2-3: 3-6, Zagreb.
- 1997: Jezična problematika u suvremenome svijetu. Kolo, Časopis Matice Hrvatske, 4 zima 1997., p. 7-17.
- 2000: O slavenskim elementima u esperantu, Filologija 35: 25-31, Zagreb.

Makedonaj temoj en Esperanto:

- 1952: Bo Zorović: "Pri makedona literaturo", La suda stelo, br. 2-3.
En la sama numero ankaŭ tradukoj de poeziaĵoj de K. Miladinov, K. Racin kaj makedonaj popolaj poeziaĵoj.
- 1953: Bo Zorović: "Pri makedona literaturo", "Jugoslavio kaj ĝiaj popoloj" p. 230-234. Slovenia Esperanto-Ligo, Eldona sekcio, Ljubljana.
- 1957: Makedona lingvo. Eseo. La suda stelo br. 6. Same: tradukoj de S. Janevski, K. Miladinov kaj notoj de K. Miladinov, K. Racin kaj S. Janevski.
- 1982: Postparolo al la libro "Por makedona lingvo". (En la esperanta traduko de libro "Za makedonskiot jazik", elmakedonigis: N. Rašić), Internacia Kultura Servo – Institut za makedonskiot jazik, Skopje-Zagreb., p.81-91.

Originala poezio en Esperanto:

- 1959: Zorović, Bo (=pseŭdonimo de Dalibor Brozović): Karnavala sonetaro. Sonetoj. "La suda stelo" 1/1959. Poste aperis ankaŭ en antologioj el 1961 i 1991:
- 1961: Reeĥoj – jugoslavia poemaro, Stafeto, "Beletraj kajeroj" n-ro 8, La Laguna p. 85-89. Karnavala sonetaro – Alkonduko post sep karnavaloj. Dediĉo. Prologo.
1. Unua soneto.
 2. Karnavala songo.
 3. Pripoetika soneto.
 4. Karnavala fablosoneto.
 5. Vortluda soneto.
 6. Karnavala farssoneto
 7. La stelo kiu ĉiam lumu
 8. Fina soneto.
- Epilogo. Al niaj kursfinintoj. Al Bolonja kongreso. (Parto de salutparolo ĉe la malfermo).
- 1991: "Kroatia Esperanta poemaro" Internacia Kultura Servo, Zagreb. ("Karnavala sonetaro" – p. 21-26, "Al niaj kursfinintoj" – p. 27, "Al Bolonja kongreso" – p. 28).

Tradukoj:

Tradukoj el la makedona:

1981: "Makedona antologio". Esperanto-societo "La Progreso" Prilep. Prilep., Olga Arbuljevska: "La ombro de Bucefalo". p. 103, Petar T. Boshkovski: "La tombo sur la alta monto". p. 104, Jovan Kotevski: "La serpento", p. 117, Mateja Matevski: "La morto de l' lampiro", p. 119, Konstantin Miladinov: "Nostalgio je la sudo", p. 121-122.

Pri la aliaj tradukoj vidu sub: Makedonaj temoj 1952 i 1957.

Tradukoj el la kroata:

1951: Dj. Držić: "Mi glorigos vin per mia poemo; Ho kara mia liuto", LSS 6/1951, p 7 (pod pseudonimom Bo Zorović),

1953: D. Cesarić: "La reveno" ("Povratak"), LSS 2/1953, p. 5 (sub pseŭdonimo Bo Zorović)

1955: Golob, Zvonimir: "Odoj al pentristo Stančić", (Ode slikaru Stančiću), LSS 2/1955, p. 28-29 (sub pseŭdonimo Bo Zorović)

1983: La reveno ("Povratak", Dobriša Cesarić). Kroata poezio (red. Ivan Krtalić). Internacia Kultura Servo. Zagreb. p. 131-132.

(LSS - La suda stelo, Oficiala organo de Jugoslavia Esperanto-Federacio, Zagreb. Redaktoroj [Ivo Borovecki, Zlata Flego, Marinko Gjivoje ktp.] kaj presejoj variis tra la eldonperiodo.)

Biografioj:

1988: Ĉi-jare, tri kongreslandanoj (Honoraj membroj). Esperanto, oktobro 1988:178. (honora membreco de UEA). Rotterdam.

Gjivoje, M. 1985: Leksikono de aktivaj jugoslaviaj esperantistoj. Borovo 1985, p. 147.

Pleadin J. 2006: Ordeno de verda plumo. Leksikono pri Esperantlingvaj verkistoj. Grafkom, Đurđevac. p. 44

Pleadin J. 2002: Biografia leksikono de kroataj esperantistoj. Grafkom, Đurđevac. p. 24

Eldonas: Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) ĉe Universala Esperanto-Asocio (UEA), Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. www.esperantic.org . ISSN 1385-2191. Redaktas: Detlev Blanke, Otto-Nagel-Str. 110, DE-12683 Berlin, tel.:+ 49-30-54 12 6 33, fakso:+ 49-30-54 98 16 38, detlev@blanke-info.de. Mendu nur ĉe UEA. Kontribuojn sendu nur al la redaktoro, per retpoŝto aŭ sur disketo/KD. Artikoloj sen indiko pri aŭtoreco estas de la redaktoro. Represo kun fontindiko permesata. Bv. sendi pruv-ekzempleron. Estas bibliografiataj ĉefe viditaj materialoj. Bv. sendi ilin al la redaktoro. Kunlaborantoj el ĉiuj regionoj de la mondo bonvenas. Por fakuloj IpI estas senpage ricevebla ĉe C.O. de UEA.
